

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Szathmári:
Nekonata
trilogio atendas
malkovron**

**Zamenhof:
Legendoj
kaj legindoj**

**Auld: 50 jaroj
da verkado en
Pajleroj kaj
stoploj**



Pli firma ponto kun Unesko

Enhavo

- 201 Historio: Senmitigi la legendon Zamenhof (Andy Künzli)
- 202 Szathmári, la hungara Orwell (Éva Tófalvi)
Vane – La estonteco (fragmento) (Sándor Szathmári, tr. Lariko Golden)
- 205 Eksteraj rilatoj: Plua plifirmiĝo ĉe Unesko (Osmo Buller)
- 206 Esperanto en radio: Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (OSIEK-AERA)
- 207 Semajno de Internacia Amikeco: Klasika iniciato ne elmodiĝis (Edvige Tantin Ackermann)
- 208 Fakaj asocioj: Ponto inter universalismoj (Bernhard Westerhoff)
Junularo: Vero el disputo (Jordan Velikov, Marion Grosjean)
- 209 Reagoj: Plej taŭgas lerniloj tutmondaj (Stefan MacGill); Unu fojon en jardeko (Wim M. A. De Smet); Plezuriga *Heroldo* (Leen Deij)
Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo
- 210 Literaturo: Kolekti kaj konservi komputile; Esperanta literaturo en la Tut-Tera Teksaĵo (Edmund Grimley Evans);
Formuli movadan libropolitikon (Reinhard Haupenthal)
- 212 Recenzoj: *Pajleroj kaj stoploj. Elektitaj prozaĵoj* (Leopoldo Knoedt);
Klera edzino (Antonio Valén); *Pikniko ĉe vojrando, Malfacilas esti dio* (Kalle Kniivilä); *Kulturo kaj teknologio* (Ulrich Lins);
Zamenhof kaj judismo (Nikola Rašić); *Pli ol homo, esperantisto!*,
La romantikulo en la 20a jarcento (Miko Sloper); *L. L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj* (Ionel Oneț)
Notoj por mia biografiento (William Auld)
- 215 Laste aperis
- 216 Loke – Fake – Persone
- 216 Abontarifoj 1998 de la Libroservo de UEA
- 217 Oficiala Informilo
- 218 Nekrologoj: Carl Stöp-Bowitz (1913-1997)
- 219 Indekso 1997

Vi trovos

ĉi tiun numeron en via leterkesto — almenaŭ se la poŝtaj servoj kunlaboros — eventuale ĝuste dum la Tago de la Esperanta Libro, la 15-an de decembro. Ni esperu ke en la sezono de jarfinaj festoj — kiujn ni deziras al vi gajaj kaj kormarmigaj — vi trovos iom da tempo ankaŭ por la legaĵoj rekomendataj de niaj diversaj recenzoj, artikoloj kaj furor-listo sur p. 209-215. Rapiĉu ĝui tiujn novajn titolojn, ĉar baldaŭ jam la januara numero de ĉi tiu revuo ambicios akapari viajn liberajn leg-momentoĵojn — en tiu nova jaro 1998 tra kiu vi espereble denove akompanos nin abonante, legante, agante kaj reagante.

Dum la Zamenhof-tagaj festoj vi eble dediĉos penson ankaŭ al alia granda figuro de nia movado, Ivo Lapenna, kiu mortis antaŭ dek jaroj, la 15-an de decembro 1987. Liaj ideoj, libroj kaj atingajoj restas kaj efikas plu inter ni. Ni kuraĝas supozi ke Lapenna estus kontenta legi la raporton sur p. 205, kiu atestas pri larĝaj perspektivoj en la plifortiĝanta kunlaboro inter Unesko kaj UEA.

La kovrilo: Foto de Lucien Hervé montras ponteton antaŭ la Unesko-konstruaĵo en Parizo.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.
Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 61; USD 35; DEM 55; JPY 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2000, 1/2 p. 1100, 1/4 p. 600, 1/8 p. 330, 1/16 p. 180. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:    

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-652-4488 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ✉ mc8750@mcmlink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ✉ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ✉ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ✉ amri@vms.huji.ac.il.

Senmitigi la legendon Zamenhof

Okdek jarojn post la morto de Zamenhof, movad-historiisto Andy Künzli vidas novan defion por esperantologoj: dispeli la nebulojn de legendeo ĉirkaŭ la figuro de la iniciatinto de nia lingvo.

Signifaj membroj de la homaro, vualitaj de reputacio de majstro kun duonsankta aŭreolo, kreske fariĝas legendoj, ju pli foras tempe ilia vivo. Nia Zamenhof ne estas escepto: lia legendo solidiĝas, almenaŭ ĉe la “averaĝa” kaj novbakita esperantistaro, pro manko de realaj scioj. Cetere, ekzistas ankaŭ inversa tendenco: la nuna tro skeptika generacio rifuzas agnoski eĉ aŭtentajn aŭreolajn legendulojn, same pro mankantaj historiaj scioj.

Ja ni disponas kelkajn pli-malpli sciencajn verkojn kun biografio de Zamenhof, kiel tiuj de Privat (1920), Boulton (1962), Holzhaus (1969) Maimon (1978) kaj Ludovikito (1982), kiu liveras ankaŭ neelĉerpeblan fontaron (1974-). Valorajn kontribuojn faras krome Z. Banet-Fornalowa, A. Cherpillod, B. Golden k.a. Tiuj merit-plenaj kompilaĵoj spegulas la sciojn de sia tempo kaj la kompetenton de siaj aŭtoroj. Certe, ili ege helpas kompreni la vivon kaj agadon de Ludoviko, sed plurfacete restas supraĵaj kaj krudmaterialaj. Rigarde al la centa mort-datreveno de Zamenhof — do post 20 jaroj — necesus nova, pli moderna monografio (en Esperanto kaj naciaj lingvoj), kiu ne sole remaĉus la jam konatajn faktojn, sed espereble ankaŭ venus al freŝaj konkludoj kaj povus respondi kelkajn ĝis nun nebulajn demandojn. Tiun laboron ne plu povus plenumi solulo, nur teamo de kompetentuloj. La ĉi-sekva listo de esplorindaj temoj samtempe invitas kaj alvokas al tiu laboro.

Etna deveno de Zamenhof

La kutima prezento de Ludoviko kiel “pola kuracisto” estas, kiel konate, nur duonvero. Reale, lia identeco estas multe pli komplika demando. Necesus restudi la ekzistantajn fontojn kaj interpretojn, kaj distingi malverŝajnaĵojn de pli realismaj asertoj.

Lingvaj konoj de Zamenhof

La reokupiĝo pri tiu temo permesus “neŭtraligi” spekulativojn pri la etimologio de iuj E-vortoj aŭ pri la konstruo de la gramatiko kaj vortfarado.

Interetna kaj socia situacio en Bjalistoko

El la fama, same legendiĝinta letero de Zamenhof al Borovko (1895) ni ekscias ke en tiu urbo la rasoj malamis sin reciproke. Indus pli detale esplori la interetnajn konfliktojn en la lokoj kie Zamenhof vivis, kaj precize priskribi la politikajn, sociajn, kulturajn kaj ekonomiajn cirkonstancojn de tiuj regionoj en tiu epoko.



Anstataŭ adoro, necesas esploro.

Familio de Zamenhof

Necesus kritike trakti la ekzistantajn fontojn kaj kompili la Zamenhofan genealogion kun profunda biografiado de liaj (bo-)familianoj. La sorto de la Zamenhofa familio certe estas aktuala lige kun la tutmondaj diskutoj pri la holokaŭsto.

Cionismo kaj juda gramatiko

Kiel konate, Zamenhof laboris por la cionismo en Moskvo kaj Varsovio. Tiu ĉapitro preskaŭ komplete mankas en la tradiciaj biografioj. Holzhaus kaj Maimon liveris la materialon kiun necesus pli profunde analizi. [La aŭtoro ankoraŭ ne povis legi la freŝan

monografion *Zamenhof kaj judismo* de A. Cherpilod — vd. p. 214 —, kiu detale traktas ĉi tiun kaj aliajn temojn menciitajn ĉi-artikole —Red.]

Hilelismo, homaranismo

Bedaŭrinde, ĉi tiu ideologio — finfine, bazo de la tuta esperantismo — hodiaŭ estas grandparte forviŝita el la konscio de la esperantistoj. Necesus pli ofte atentigi pri la pacismaj idealoj de Zamenhof, eventuale ankaŭ por doni novan dimension al la Esperanta propagando, bedaŭrinde ofte limigita al la temo “artefarita neŭtrala lingvo”, pri kiu tiom da nuntempanoj mokas.

Rilatoj kun la ceteraj E-aktivuloj

Ni scias ke la avangardaj ideoj de Zamenhof ne ĉiam trovis aprobon ĉe liaj konservemaj kaj naciismaj kunbatalantoj. Necesus aktualigita studo pri la organizaj demandoj, almenaŭ ekde kiam Zamenhof proponis tutmondan ligon e-istan, pri la cirkonstancoj de la Ido-krizo kaj de la fondo de UEA.

Paroladoj de Zamenhof

Liaj paroladoj, precipe la dumkongresaj, ŝajnas al mi daŭre aktualaj, same rilate la demandojn de la movada organizo kiel koncerne ilian ideologian fonon. La tasko de la esperantologoj estus ekzemple reeldoni tiujn paroladojn, historie enkadrigi ilin, komenti la eventojn, priglosadi malklaraĵojn, aldoni bio- kaj bibliografiaĵojn.

Mia temo-listo ne estas kompleta. Mi esperas iom kontribui per ideoj por revigligo de la zamenhofologio kaj esperantologio: ne nur por senmitigi la legendon Zamenhof, sed cele al eldono de moderna monografio pri la kreinto de Esperanto kaj al longdaŭra scienca okupiĝo pri la temo, kies rezultoj ankaŭ ne manku en onta reviziita *Enciklopedio de Esperanto* — alia enorma defio por esperantologoj en la venonta jarcento.

Almenaŭ unu veron ni konas: Zamenhof, treege modesta, niel celis atingi la reputacion de majstro kun duonsankta aŭreolo. Per ĝi lin ornamis lia adeptaro. Nu, kial ne?

Andy Künzli (Svislando)

Szathmári, la hungara

Malmultaj scias ke la jubileanta aŭtoro de *Kazohinio*, Sándor Szathmári (1897-1974), verkis ankaŭ hungarlingvan trilogion, *Hiába* ("Vane"). Éva Tófalvi demonstris la unikecon de tiu "kontraŭ-utopio" en eseo premiita en Belartaj Konkursoj (1995). Jen redaktitaj partoj el ŝia eseo kaj roman-fragmento tradukita de Lariko Golden.

Estas malfacile kompreni verkiston kies verkaro konsistas el originalaj verkoj en du malsamaj lingvoj. Por esploranto la teksto malfacilas eĉ pli se temas pri du tiel raraj lingvoj kiel la hungara kaj Esperanto.

Sándor Szathmári estas unikaĵo en la mondliteraturo. Kiel denaska hungaro kaj spirite denaska esperantisto, li uzis en siaj romanoj, noveloj, studoj kaj dramaj tekstoj ambaŭ lingvojn. Lia personeco estis tiom orientita en la direkto de internaciismo ke liaj origine hungarlingvaj verkoj ŝajnas esti kvazaŭ origine Esperantaj.

Tia estas ankaŭ lia elstara romano, kuŝinta en tirkesto dum ne malpli ol 59 jaroj (!). Temas pri la tria parto de la trilogio *Hiába* ("Vane"), titolita "La estonteco".

Szathmári (kiun mi persone ne konis) ofte menciis en sia aŭtobiografio kaj intervjuoj ke komence de la 30-aj jaroj li verkis trilogion pri la senesperaj homaj klopodoj plibonigi la homan sorton. Tiun ĉi inspiron li ricevis de unu sia amiko, pentroartisto Péter Illésy, kiu foje diris al Szathmári: "Mi havas unu temon: supre, en la maldekstra



angulo, sidas Budho en sia tipa pozo kaj meditas. En la dekstra angulo predikas Jesuo. Malsupre silentas la Sfinkso, duone kovrita de sablo. Meze estas la malkreska luno. Ĉu vi ne povus doni al tio trafan titolon?"

Szathmári respondis: "Vane".

Poste li rakontas: "Li (t.e. Illésy) ne pentris la imagitan bildon, sed la titolo ekvivis en mi kaj mi decidis priskribi tiun ĉi titolon kiel romanon. . . La libron mi verkis inter

Sándor Szathmári: *Vane* — *La estonteco* (fragmento)

En 2082 Kálmán Hajós ricevas permeson fondi ene de la hungaria soveto sian utopian kolonion, kie la homoj vivu pli bonan, pli puran vivon. Sed tuj post la unuaj tagoj evidentiĝas ke la eksteraj opini-diferencoj ne restis ekster. . . Fine la partio de la "antropistoj" venkas en sanga batalo kontraŭ la marksistoj, kiuj estis lojalaj al la ekstera soveta lando. Hajós en la lasta momento elektas la flankon de la antropistoj, tial oni lasas lin en lia posteno. Komenciĝas la antropisma reorganizo de la kolonio kun la gvido de kelkaj elektitaj komisiitoj.

[. . .]

Pasis tagoj kaj semajnoj, sed la soveto daŭre ne atakis. De la kolonio neniu kuraĝis eliri, eĉ telefone oni ne komunikis. Pretiĝis kaj prov-funkciis la materi-transformilo. Oni alĝustigis ĝin al fero kaj aluminio. Tiuj du metaloj estas necesaj partoj de ĉiuj maŝinoj. Rezulte de la funkciado de la aparato ambaŭ metaloj transformiĝis al plumbo en kelkaj minutoj, sed produktante tiom da varmo ke ili unue fandiĝis. Neniu problemo, des pli bone.

Dume oni organizis ankaŭ la klerigan laboron, en formo


de diskutvesperoj. En ĉiu kunveno la gvidanto levis unu demandon, al kiu ĉiuj reagis. Ĉiuj ĝojis pri tiu granda demokratieco.

— Vidu — oni diris —, ekstere oni simple rakontis dum la ceremonioj kion ni devas kredi, dum ĉi tie la maŝinistaro mem pridiskutas la problemojn en nobla konkuro.

Sed la diskutoj tiumanieraj plej ofte fariĝis senfinaj. Neniu sukcesis konvinki la alian, kaj ofte oni eĉ ne sciis kiu el la diversaj opinioj estas pli proksima al la antropisma pensmaniero.

Oni levis la demandon kio aŭ kiu estu la decida forumo de la diskutoj. Multaj diris ke la antropismo, kiel perfekta socia egaligo de potencialoj, povas akcepti nur voĉplimulton de la maŝinistoj. Sed estis objetite ke ankaŭ la maŝinistoj ne povas esti konsiderataj kiel egalaj laŭ la intelekta potencialo, tial ke ĉe multaj el ili la kapabloj restas ankoraŭ subpremitaj de la antaŭa edukado, ĉar la marksistoj ja ne povas kalkuliĝi eĉ kiel maŝinistoj. Eĉ se ilia profesio estas maŝinista, ilia pensmaniero estas tamen

ra Orwell



Sándor Szathmári
en sia hejmo

La titolpaĝo de la hungara, ĝis nun sola, eldono (1991) de "Vane", kiun prizorgis Éva Tófalvi.

1931-1932... Laŭ mia konvinko esenca manko estas en la homa naturo mem. Ĉiam leviĝis antaŭ mi pli kaj pli alten *La tragedio de l' homo* [de Imre Madách — É.T.], la rekono de la leĝo pri la eterna malfeliĉo... la homo en ĉiu tempo travivos la samon. El la sango de la profetoj ĉiam elkreskos nova tiranismo... kun la samaj fenomenoj, tamen la homo ĉiutempe esperos ke la eraro troviĝas nur en la slogano kaj ke novaj doktrinoj kaj nova slogano ĉion reĝustigos. La homo eĉ kredos ke la ekzistanta socia sistemo estas esence alia ol la antaŭa, nur ne efektive aŭtenta, sed ke tia estos la sekva... Mi tre klare vidis la funkciadon de la malnova instinkto de interbatiĝo, kiu ĉiam kaŭzos malkonkordon kaj subpremon, kaj ke la homo mem elpensos ĉiam ion por povi interbatiĝi" — diras Szathmári en sia aŭtobiografio.

Pri la trilogio li parolis "nebule", ŝajnigante ke ĝi ne plu ekzistas, kvazaŭ li mem estus ĝin estinginta.

Dank' al Dio li ne faris tion. Li transdonis la verkon al sia bona amiko esperantista Kálmán Pandur (mortinta en februaro 1995). Kaj tiu ĉi amiko konservis la manuskripton, malgraŭ tio ke ĝia kontraŭkomunisma tendenco povus kaŭzi al li seriozajn malagrablojn — se ekzemple polico traekzamenus lian loĝejon. Feliĉe, la romano ne estis konfiskita, kaj kiam Pandur eksciis ke mi serĉas tiun ĉi delonge "perditan" verkon, li volonte transdonis ĝin al mi.

Kia surprizo trafis min! Mi povis legi majstroverkon de aŭtoro kiu de longe ne estas inter la vivantoj. Legante tiun ĉi trian volumon de *Vane* — *La estonteco*, paĝon post paĝo mi konvinkiĝis pli kaj pli ke mi tenas enmane trezoron, kiu ne plu rajtas esti kaŝita antaŭ la publiko.

Pri kio temas *Vane* — *La estonteco*? La intrigo okazas en la fora estonteco, 150 jarojn post kiam la romano mem naskiĝis, do en 2082. Szathmári profetas ke en la okdekaj jaroj de la nuna (dudeka) jarcento (ni ne forgesu ke li mortis en 1974) la revolucioj kaŭzos grandajn kaj avantaĝajn ŝanĝojn, sed kelkajn jarojn poste ekregos totala komunisma diktaturo — ankaŭ en Hungario. Kálmán

proleta. Plimulto de la voĉoj povos esti decida nur en fora futuro, kiam la kompleta socia egaligo kunportos ankaŭ la intelektan egaligon.

Fine oni interkonsentis ke la decida forumo estu Pollák mem [la gvidanto de la antropisma partio — *Red.*], parte ĉar li estas unu el la elektitaj komisiitoj, do li plenumas la postulojn de la elekta principo, aliflanke ĉar li ĉiam estis intelekta gvidanto, do ankaŭ liaj kapabloj taŭgas.

Estis kelkaj kiuj objetis ke tio estas revenigo de la malnova, elmodiĝinta aŭtoritat-principo, sed tiuj pli kleriĝintaj riproĉis ilin dirante ke oni devas pensi evoluike: kvankam la nova reĝimo uzas la samajn rimedojn kiel la malnova, ĝi tamen esence malsamas, ĉar antaŭe la ĉefproletaro estis subpremanto de la maŝinistoj, sed nun la gvidantaro estas nur rimedo helpanta efektiviĝi la eksplode kreskintan maŝinistan memkonscion, do esence ĝi estas ĝuste la malo de la reacia aŭtoritat-principo. [...]

Okazis do tiel ke fine de la diskutoj oni malfermis sigelitan koverton, en kiu troviĝis la opinio de Pollák, kaj kies respondo estis plej proksima, tiu gajnis.

Unue oni kontentiĝis per la morala sukceso, sed poste


oni volis pravi per videblaj signoj la eminentecon de tiuj kiuj tiel gajnis la konkursojn. Kompreneble, ordenojn oni ne povis disdoni, ĉar tio, unu el la ĉefaj manieroj produkti interhomajn diferencojn, estis malakceptita de la antropismo. La absolute homogena homa socio fariĝis la devizo.

Sekve oni trovis la solvon disdoni al la gajnintoj portretojn de Hajós kun lia propramane subskribo: jen denove io same transformale alia ol doni ordenojn. La portreto estis simpla pruvido kaj ne donis rajton al ia ajn heterogena elstaro, kiel ekzemple la granda, kvinpinta stelo de la Markso-ordeno.

Sed nenion oni povas fari tiel ke ĉiuj kontentiĝu, ĉiam troviĝas ĝenujoj; ekzemple iu alparolanto asertis ke tio estas ĝenokulto, kiu ne akordiĝas kun la principo de homogeneco, sed oni klarigis al li ke la metodo ŝajnas sama nur en la metodo, dum ĝi estas esence transformale alia: ĉar en la portretoj oni ne estimas Hajós kiel personon, sed oni festas la novan, liberan homogenecon mem de la maŝinistaro, de kiu Hajós estas nur enkarniga simbolo, la gvidanto.

(daŭrigo ĉe p. 204)

Hajós, la juna “kaplaboristo” (en la specifa enfutura lingvonormo de Szathmári tio signifas “intelektulo”) estas opoziciulo, sed tion li ne povas rekte esprimi en totale kontrolata ŝtato. Li volas profiti de la unusola eblo kiun la potenco garantias: fondi aŭtarcian kolonion, kies celo, laŭ la soveta sistemo, estas produkti kaj konsumi pli ekonomie kadre de komunumo kaj tiamaniere helpi la tiel nomatan “evoluo”. Sed Hajós havas kaŝitan celon: li volas demokration en la kolonio, kies gvidanto li fariĝis. Paŝo post paŝo liaj klopodoj fiaskas. La homoj edukitaj en la diktaturo de soveta tipo tute ne komprenas lian intencon. La komunumanoj grupiĝas en diversaj marksismaj-leninismaj sektoj, kiuj interbatalas. Ekregas anarkio, kaj Hajós vole-nevole, eĉ ne rimarkante ŝanĝojn en sia propra animo, fariĝas diktatoro.



Perfekta civitano: Hungara Esperanto-Asocio eldonis en 1988 plenan novelaron de Szathmári.

Fine ne nur li estas murdata sekve de atenco, sed la atenculo mem eksplodigas la tutan kolonion, el kies loĝantoj neniu postvivis.

La verko de Szathmári estas la plej pesimisma negativa utopio. En tiu ĉi verko perdiĝas ĉiu espero. “Insulo” kiel kutima rifuĝejo de la utopiaj verkoj komplete pereas, neniigas. Dume ĉirkaŭ ĝiaj ruinoj ekzistas plu la totala diktaturo...

Laŭ strukturo la romano iom similas al *La besto-farmo* de Orwell, kaj la totalisma atmosfero memorigas la romanon 1984 de tiu aŭtoro. Sed mi emfazu ke Szathmári surpaperigis sian verkon 17 jarojn pli frue ol Orwell eldonis 1984. Eble Szathmári, se li ne estus rezigninta ĝustatempe eldoni sian romanon, ne ricevus hodiaŭ la epiteton “la hungara Orwell”, sed Orwell estus nomata “la angla Szathmári”.

Laŭ La du testamentoj de Sándor Szathmári de Éva Tófalvi (Hungario)

(daŭrigita de p. 203)

— Mi malkontentas ankaŭ pri la gvidado — diris la alparolanto —, en homogena antropisma socio nur la komunumo rajtas gvidi sin mem, gvidantoj eĉ ne ekzistas.

Tiu estis la sola aserto de la pala, juna alparolanto kiun la aŭskultantaro serioze pripensis. Ili konstatis ke la titolo “gvidantaro” estas efektive absurda en homogena socio, kie tiu instanco efektive ne gvidas, nur realigas la komunan volon. Hodiaŭ ne ekzistas rangodiferencoj, ĉiu staras sur la sama ebena kun ĉiu alia. Ene de tiu ebena ekzistas centro kaj rando, sed neniu diferenco laŭ nivelo.

Oni decidis sendi delegacion al Hajós, petante lin ke anstataŭ la prezidenta titolo li elektu ion pli kongruan kun la antropisma pensmaniero. La palulo ankoraŭ diris ion tian ke li celis alie per siaj vortoj, sed la aŭskultantaro iom post iom konvinkigis ke la alparolanto ne vere scias kion li entute volas, kaj oni ĝentile preteratentis lin.

Kiam la delegacio alvenis al Hajós, tiu ĉi tuj aranĝis ke eĉ la nomo de la gvidantaro ne plu enhavu esprimon memorigantan pri la pasinteco, sed esprimu ĝian transformale alian esencon ankaŭ per tio. La komisiitoj venis al la decido ke la prezidenton oni nomos ekde tiam Centra Maŝinisto, kaj la tri ĉefkomisiitojn Ena Cirklo, kio kongruas kun la principoj de la samebena socio. Kiam *Lumturo* publikigis tion, oni bonvenigis ĝin per ĝenerala ĝojkriado, kaj oni ĉirkaŭportadis en procesio kun lampioj la unuan foton de Hajós kiun li subskribis kiel “Kálmán Hajós, Centra Maŝinisto”. Samtempe pluraj levis la proponon ke Hajós, kiu estas tiom grava kolono de la absoluta homogeneco, estu elektita kiel honora dumviva Centra Maŝinisto, kaj la maŝinistaro, por doni signon de sia dankemo, altigu lian proviz-kvoton al trioblo. Tion kontraŭis nur la palulo, kiu ĉiuokaze estis jam suspektinda. Pluraj vidis en li agenton provokan, senditan de la soveto por renversi la homogenan egalecon vekante disharmonion. Finfine la baza principo de antropismo estas ja la rekompenco de la peno, kaj ĉu ne estus la plej granda maljustaĵo, se tiu kiu penis plej

multe por la egaleco, ne ricevus la merititan kompenson?

La problemo estis nur tio ke Hajós ne akceptis.

Tio naskis diversajn sentojn en la partio. Oni opiniis ke la ofero estis komunuma volo, kiun la Centro ne rajtas kontraŭstari, estante nur efektiviganto de la komunuma volo kaj ne rajtigita al kritikado, ĉar se ĝi repuŝus la oferon, tio signifus ke en iu rilato ĝi staras super ili. Fine, kaj tio estis la ĉefa argumento, la Centro de la libera maŝinista socio ne povas vivi en la samaj cirkonstancoj kiel la sklavoj de la proleta reĝimo. Oni devas montri al la ekstera mondo ke en libera patrujo regas bonfarto; la reprezentanta viro devas reprezenti.

[...]

Dume Kardos finkonstruis la materi-transformilon, kaj ĉar ĝi devis kunlabori kun aliaj armilspecoj, oni aranĝis ke la armitaj fortoj disigu al du partoj: oni lasis al Potecki la internan ordigon kaj taskis al Kardos la defendon de la lando. Oni nomis ilin ena kaj ekstera gardistaroj.

Potecki protestis kontraŭ tio. Li timis pritrancan de lia potenco, kaj objektis ke tio povas dividi la maŝinistaron, do malrekte ankaŭ la homogenecon. Pollák klarigis ke la homogeneco restos, ĉar ambaŭ armilspecoj laboros por la komuna intereso sur la sama ebena, kvankam en aliaj kampoj.

Potecki ne estis filozofo, ne povis diri ion ajn kontraŭ tio, kaj senprokraste li cedis al la ekstera gardistaro la tankistojn kaj flamjetistojn. Por li restis nur la maŝinapililoj, la ret-kaptistoj kaj la pedsoldatoj kun fusiloj.

La sekvan tagon Kardos transprenis la taĉmentojn. Nur post tio Potecki konsciigis ke Kardos propradire neglektas lin, kaj ke certe devas okazi iu abomena intrigo malantaŭ lia dorso, kvankam li havas tiom da meritoj ke sen li Hajós ne estus Centra Maŝinisto hodiaŭ. Oni devintus rekompenci lin.

Ankaŭ la taĉment-komisiitoj de la ena gardistaro ne ĝojis pri la malpligrandiĝo de sia formacio. [...]

Plua plifirmiĝo ĉe Unesko

La aktiviĝo de la Unesko-agado de UEA portis pliajn fruktojn en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) la 21-an de novembro en la sidejo de Unesko en Parizo.

Ĝi estis la unua post la formala kompletigo de la NRO-reformo (vd. sept., p. 146). Ĝenerala direktoro Federico Mayor alparolis la konferencon, emfazante la rolon de NRO-j kiel ponto inter Unesko kaj ordinaraĵoj civitanaj. Li precipe alvokis NRO-jn al konkreta agado kadre de la Unesko-programo de packulturo.

ILEI en operaciaj rilatoj

La delegacio de UEA konsistis el vicprezidentino Renée Triolle, ĝenerala direktoro Osmo Buller kaj la konstanta Unesko-representanto, d-rino Barbara Despiney. Ili tamen ne estis la sola esperantista delegacio. Nome, lastmomente antaŭ la konferenco venis la ĝojiga informo ke — male al sia antaŭa decido — Unesko asignis la statuson de operaciaj rilatoj ankaŭ al ILEI. Sekve ILEI rajtis partopreni en la konferenco, kaj ĝi sendis reprezentanton, d-ron François Lo Jacomo.

Post la reformo 16 organizaĵoj (i.a. Internacia Asocio de Universitatoj, ĉe kiu UEA lobbias por la aliĝpeto de AIS) estas en asociaj rilatoj kun Unesko, dum 63 (i.a. Internacia PEN) havas

konsultajn kaj 165 operaciajn rilatojn. Krome, 111 organizaĵoj ricevis operacian statuson por unujara provperiodo. Malpli ol duono el la NRO-j kiuj antaŭe havis oficialajn ligojn kun Unesko, trairis sukcese la elprovon de la NRO-reformo. UEA kaj ILEI povas plenrajte gratuli sin pri sia atingo, ne forgesante ke ĝia konservo postulas



daŭran aktivadon. Ĉar krome TEJO rekte rilatas kun la Junulara Fakto de Unesko, tiu aktivado plej efike realiĝos per kunordigita sektora agado, kiel priskribite ĉi-revue pasintjare (jul.-aŭg. '96, p. 121): UEA okupiĝos ĉefe pri komunikado kaj kulturo, ILEI pri edukado, TEJO pri junularo.

UEA en la NRO-konsilio

La reordigo de la kunlaboro inter Unesko kaj la NRO-komunumo mult-

rilate ne estas preta, kaj restas multe da malklareco. Por helpi klarigi la situacion ĝis la sekva NRO-konferenco fine de 1998, la ĉi-foja konferenco elektis reprezentajn organojn de la NRO-komunumo: Kontaktkomitaton el dudeko da NRO-j kaj Konsilion el kvardeko da NRO-j. Ilia taskaro estas ankoraŭ iom nebula, sed la unua kunveno de la Konsilio komence de decembro supozeble kreos ian klarecon. UEA fariĝis membro de la Konsilio, kio atestas pri prestiĝo kiun ĝi jam tradicie ĝuas en la NRO-komunumo, kaj metas ĝin en avanan pozicion en la nuna transira periodo.

El la agemo de UEA rezultis lastatempe ankaŭ aliaj, eĉ surprizaj, respondecoj. Unesko invitis d-rinon Despiney al malgranda komitato por prepari konferencon omaĝe al la 100-a datreveno de la malkovro de radiumo. Pasintjare ŝi jam membris en la organiza komitato de Unesko-kolokvo de entreprenoj kaj NRO-j. Sekve de tiu kolokvo kreiĝis Internacia Asocio por Partnereco inter Entreprenoj kaj NRO-j. UEA estas ĝia membro kaj esperas povi plekti en ĝian agadon fakajn asociojn kiel Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

Osmo Buller

Poste Potecki aperis ĉe Hajós, kaj petis ke tiuj membroj de la ena gardistaro kiuj partoprenis la revolucion rajtu porti specialan ĉapelon, por esti iel rekompencataj.

Hajós akceptis.

Sekve Potecki kaj liaj kunuloj fondis la Asocion de Sangintaj Revolucianoj, kaj postulis ke oni levu la provizkvoton de la ĉampionoj de egaleco per dudek procentoj. Tio estu la danko de la komunumo pro tio kion la batalantoj faris en la intereso de la komunumo. [...]

Dume Pollák venis al la ideo ke tiujn kiuj dum la diskutvesperoj pleje alproksimiĝis al la mondrigardo de la absoluta egaleco, oni ne rajtus lasi perdiĝi. Des pli necesas nun, kiam Potecki kaj liaj kunuloj komencis organiziĝi, kontraŭpezo de bone edukita kaj centrofidela gvardio.

Tial oni ordonis ke la intelektajn gajnintojn oni enlistigu, kaj el ili oni formis la Societon de Homogena Intelektito.

Poste la Ena Cirklo volonte elektis el tiu societo la taŭgajn personojn por diversaj oficoj. Precipe la taĉment-komisiitoj de la ekstera gardistaro estis elektitaj inter ili, kio grave pligrandigis la intereson pri la diskutvesperoj kaj kreskigis la ambicion.

Potecki kaj liaj kunuloj fariĝis pli kaj pli koleraj.

— Ĉu tiuj estas la ĉampionoj de egaleco — ili diradis — kiuj nun flatas la Centron? Ĉu tio estas egaleco, se personoj arbitre elektitaj de la Centro fariĝas "taĉment-komisiitoj"?

La Ena Cirklo respondis pere de *Lumturo*, deklarante ke ĝi estis elektita de la komunumo por unu jaro, kaj ĉiu kiu vekas malkonkordon, rompas la egalecon. [...]


Potecki kaj liaj kunuloj prezentis al *Lumturo* respondartikolon, sed tiu laŭ ordono de Hajós ne aperigis ĝin. [...] Sekve kelkaj membroj, kiuj simpatiis kun Potecki, eliris el la redakcio kaj fondis la gazeton *Ardanta Suno de Maŝinistoj*, en kiu ili deklaris kiel bela tipo de demokratio estas tiu en kiu la komuna, oficiala gazeto de la maŝinistoj rajtas publikigi nur la opinion de la Centro; sed ne estas bone inciti la maŝinistaron, ĉar venos malbono, kiam la dormanta leono vekigis.

Tradukis el la hungara Lariko Golden

(El: Sándor Szathmári: *Hiába*, Budapest: Szépirodalmi Könyvkiadó, 1991, p. 201-207)

NOTO: *evoluike* kaj *transformale* estas neologismoj de Szathmári en la hungara originalo, kreitaj por parodiigi ideologozan lingvajon.

Esperanto en radio



Pola Radio en Interreto

De la 26-a de oktobro, 4-minutaj novaĵoj de Pola Radio en Esperanto estas aŭdeblaj ĉiutage tra TTT, ĉe <http://www.wrn.org/stations/poland.html>. Tia aŭskultado tra la reto facilas se vi jam kutimas al ĝi: senpaga programo estas havebla por aldoni al via krozo. Por pli da klarigoj, aliru la paĝojn de OSIEK-AERA pri sondokumentoj: ili uzas la saman teknologion. En Eŭropo, tiuj novaĵoj jam delonge estas aŭskulteblaj, aldone al la rekta dissendado de Varsovio, tra la satelita kaj kablo-retaj programoj de World Radio Network (Monda RadioReto en Londono, direktoro Karl Miosga). Konfirmu la aŭskulton al Londono (✉ online@wrn.org) kaj precipe al Varsovio (✉ pettyn@radio.com.pl), ĉar de la reagoj de la ret-aŭskultantoj dependos ĉu de la 1-a de januaro 1998 komenciĝos plena duonhora E-elsendo per la reto. Polan Radion aparte interesas kion vi pensas: pri la signifo de la nova iniciato de Pola Radio por la globskala informado; pri la nuna 4-minuta longeco de la programero; kiaspecajn programerojn vi dezirus aŭskulti en eventuale pli-longigota programo.

Lokaj stacioj

Du lokaj stacioj kiuj naskiĝis dum la pasintaj monatoj:

En Brazilo, Kultura E-Centro en Goiânia jam de kelkaj monatoj dissendas kvaronhoran programon pere de la loka universitata stacio: ĉiusabate, ekde 20:00 per la meza ondo 870 kHz. La dulingva (portugala kaj Esperanta) elsendo nomiĝas "Esperanto em perspectiva". Eblas telefoni al la stacio dum la elsendo: ☎+55/(0)62/821-1709. Parolisto estas d-ro Alvaro Luiz Rodrigues, redaktas f-ino Nilva Cavalcante Bandeira. Materialon sendu al Kultura Esperanto-Centro, Rua 5 n. 15, Sala 3 Centro, BR-74120-030 Goiânia (GO), Brazilo.

En Doneck (Ukrainio) ĉiun unuan kaj trian lundon en la monato, je la loka horo 22:45-23:00 eblas aŭskulti Esperanto-programon per FM 106.8 MHz. Prizorgas ĝin Vasilij Milušnikov. Adreso: Eŭropo plus Donbas, "Kurte", str. Iljiĉa 109a, UA-340059 Doneck, Ukrainio; ✉ va@radiofm.donetsk.ua; <http://www.europaplus.com.ua>.

Internaciaj radioelsendoj en Esperanto (horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

05:30-06:00*	Pola R. Varsovio	Sat (1)	Eŭropo
11:00-11:27	Ĉina R. Int.	7170, 9570	Azio Orienta, Japanio, Koreio
13:00-13:27	Ĉina R. Int.	11840, 11600	Azio Sudorienta
14:30-15:00*	Pola R. Varsovio	7145, 7285, 6000, Sat (1)	Eŭropo
19:00-19:30*	Pola R. Varsovio	7285, 6095, Sat (1)	Eŭropo
20:00-20:27	Ĉina R. Int.	7405, 9965	Eŭropo
20:25-20:30	Pola R. Vars. / WRN	Sat (2)	Eŭropo
21:30-21:55*	Pola R. Varsovio	7270, 6035, 6095	Eŭropo
22:30-22:57	Ĉina R. Int.	9860, 6950	Latin-Ameriko, Eŭropo

Dimanĉaj elsendoj

05:05-05:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (3)	Eŭropo
07:00-07:30	R. Havano Kubo	9820	Azio Pacifika, Ameriko Norda
15:00-15:30	R. Havano Kubo	11760	Ameriko, Karibio
15:05-15:30	R. Aŭstria Int.	6155, 13730, Sat (3)	Eŭropo, Afriko Okcidenta
		9655	Azio Okcidenta
		13710	Azio Sudorienta
19:30-20:00	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediteraneo
20:20-20:30*	R. Vatikana	527, 1530, 5882, 4005, Sat (4)	Eŭropo
		Sat (5)	Ameriko
22:00-22:30	R. Havano Kubo	9550, 13715	Eŭropo, Mediteraneo
23:30-	R. Havano Kubo	11760, 11875, 6070	Ameriko, Karibio

Rimarko: Dimanĉaj elsendoj de R. Vatikana ankaŭ dum kristanaj festotagoj, samhore.

Dum aliaj tagoj

00:05-00:30	R. Aŭstria Int.	9870, 9495	Ameriko Suda (lunde)
		7325	Ameriko Norda (lunde)
20:00-20:20	RAI Internacia	7185, 6015, Sat (6)	Eŭropo (sabate)
20:20-20:35*	R. Vatikana	1611, 6185	Eŭropo (merkrede)
		Sat (7)	Azio, Afriko (merkrede)
20:30-20:45*	Estona R.	5925	Eŭropo (marde)

*ekde 28 marto 1998 unu horon pli frue (ĉar konstanta laŭ Meza Eŭropa Tempo)

Satelitaj indikoj

- (1) Pola R. Eutelsat II F6 13°E (Hot Bird), 11.476 GHz Hpol (TVPolonia), 7.38 MHz
- (2) Pola R. / WRN Astra 19.2 E, 11.538 GHz Vpol (VH1), 7.38 MHz (World Radio Network 1 Europe, 4-min. realsendo de la posttagmeza programo de Pola Radio; disaŭdigita tra multaj urbaj kablo-retoj)
- (3) R. Aŭstria Int. Astra 19.2 E, 11.141 GHz Hpol (Bayern 3), 8.10 MHz, per Astra Dĝita Radio (ADR)
- (4) R. Vatikana Eutelsat II F1 13 E, 10.987 GHz Vpol (NBC), 7.38 MHz (Eŭropo)
- (5) R. Vatikana Intelsat 603: 34.5 W, 4097.75 MHz LHCP, aŭda kanalo A-1 (Atlantiko, Amerikoj)
- (6) RAI Internacia Eutelsat 13 E (Hot Bird 1), 11.446 MHz Vpol (Rai Due), 7.56 MHz
- (7) R. Vatikana Intelsat 704: 66 E, 4152.45 MHz RHCP, aŭda kanalo I-1 (Azio, Afriko)

fonto: OSIEK-AERA, Amikaro de Esperanto en Radio
<<http://members.aol.com/OSIEK/AERA>>

Klasika iniciato ne elmodiĝis

La Semajno de Internacia Amikeco (SIA), kiu naskiĝis en 1969, esprimas la "internan ideon" per aliaj vortoj: "Amikeco trans limoj" — limoj naciaj, rasaj, lingvaj, kulturaj, politikaj kaj religiaj. Ideoj plu aktualaj: sed kion pri la praktika flanko de SIA hodiaŭ?

La Semajno okazis la unuan fojon en 1969, inter la 16-a kaj 22-a de februaro. Ĝi estis iniciato de la fama sveda esperantisto Erik Carlén (1906-86), vicprezidinto (1964-74) de UEA, kiu antaŭvidis laborplanon kaj aparaton por prizorgi ĝin kaj fiksas ĝian daton: ĉiujare la lasta plena semajno de februaro. Ni povas diri ke la Semajno estis kreita de parolantoj de la internacia lingvo kiel agnosko de la valoro kaj plezuro de amikeco per Esperanto trans naciaj limoj.



Amikeco trans limoj

SIA havas tamen ankaŭ du pliajn celojn. Unue, plifortigi kaj plivigligi la kontaktojn inter diverslandaj esperantistoj; due, informadi pri nia lingvo kaj movado ekster la esperantistaj rondoj. Multaj grupoj, asocioj, eĉ landaj asocioj sekvis la instigon de Carlén, kaj divers-specaj agadoj ekfloris por celebri la semajnon. Sed, bedaŭrinde, iom post iom la solenado de SIA en ĉiu lando malvigligiĝis, malbuntigiĝis kaj preskaŭ malaperis. Nur kelkaj grupoj obstine plu tenas la tradicion — ne necese grandioze, sed konstante.

Sed SIA ja povas daŭrigi sian vojon: pli simple, pli elaste, pli moderne — des pli ke ni apenaŭ havas aliajn tradiciajn festotagojn en la esperantista komunumo. Venis la tempo repreni la kutimon celebri ĝin tutmonde, kio tre bone enkadriĝas en diversaj punktoj de Kampanjo 2000. Jen ankaŭ plua okazo informadi pri Esperanto, pri nia "popolo", pri niaj agadoj. La dato proksimiĝas, preparu vin kaj vian planon jam nun, kaj se tiu dato por via lando aŭ urbo

maltaŭgas, elektu alian pli konvenan. Memoru ke ekzistas ankaŭ la emblemo kun "Amikeco trans limoj", vera "varmarko" de la Semajno: uzu ĝin, sed en la fiksita formo.

Kion fari, do?

Unue: informu la amaskomunikilojn en via lando aŭ urbo ke la Esperanto-movado festos Semajnon de Internacia Amikeco, menciante ĝian signifon kaj la aranĝojn. Kompreneble akcentu ke la Semajno celas ne nur esperantistojn, sed ĉiujn; menciui ke en la nuna tensi-plena mondo ni des pli bezonas transliman amikecon — ĉu personan, ĉu grupan, ĉu institucian —, kiu kontribuas al la konservado de la paco.

Due, trie kaj tiel plu: organizu ion ajn kun rilato al internacia amikeco. Komencu per io facila kaj post iom da spertiĝo transiru al aranĝoj pli altnivelaj, pli komplikaj. Ĉu sugestojn?

— En festa kunveno skribu komunan salutkarton al eksterlandaj esperantistoj, decidu donaci libron aŭ revu-abonon al Esperanto-grupo en lando malpli pagipova, aŭ ... adoptu ĝemelan E-grupon de tie;

— se la grupo loĝas proksime al landlimo, rendevuu najbarlandan E-grupon, interŝanĝu donacetojn, ekskursu kune, se eble zorgu pri urbodoma akcepto por emfazi la gravecon de amikeco kaj interŝanĝoj kun najbaroj;

— proponu al viaj samurbanoj koncerton — ĉu de koruso kun kantoj ankaŭ en Esperanto, ĉu de esperantista muzikisto el alia lando — aŭ ekspozicion de desegnaĵoj temrilataj (se vi bezonas materialon, skribu al mi!);

— kaj nepre ne forgesu sendi mallongan informon pri la aranĝo post la okazigo al la lokaj amaskomunikiloj, sed ankaŭ al UEA, al mi mem fakse (+39/40/350-093) aŭ rete (nored@iol.it) kaj al Esperanto-revuoj kaj -radioj.

Semajno de Internacia Amikeco: ne nur bele vortumu la ideon, konkretigu ĝin per agoj!

Edvige Tantin Ackermann

Komisiito de UEA pri Semajno de Internacia Amikeco



**Erik Carlén,
la "patro" de SIA**

SCIENCA REVUO, oficiala organo de
INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (ISAE)
Kajero n-ro 170, Volumo 48 (1), Junio 1997

ENHAVO

REDAKTORA

Antaŭparolo	3
Laŭdacio: Carl Stop-Bowitz (NO)	5

ORIGINALAJ ARTIKOLOJ

CUMBERLIDGE Neil (US), SACHS Rüdiger (DE):

Ĉu vi estas *Homo sapiens* aŭ *Antropo regnotipa*?

BOCIORT Ignat Florian (RO):

Pri la estetiko de la beletra verko:

Aktualaj kontraŭdiroj (Parto I)

DUDICH Endre (HU):

Tersciencoj — ĉu krizo aŭ novaj perspektivoj?

NAGATA Hiroshi (JP):

Kernvorto-parametro en genera gramatiko:

Apliko al eldiroj de infanoj denaske lernantaj Esperanton

KAVKA Josef (CA):

Ĥ en mineralnomoj

SCIENCA EĤO

Pluaj informoj ĉe la prezidanto de ISAE: Prof. d-ro Rüdiger Sachs,
Ernst-Metz-Str. 3, DE-37269 Eschwege, Germanio.

Praga Manifesto

Ĝis redaktotino la nombro de subskriboj atingis

10 083.

Ponto inter universalismoj

La fondo de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) estis iniciatita antaŭ 25 jaroj, dum la 57-a UK (Portland, 1972). La historio de la kontakto kaj kunlaboro inter la movadoj esperantista kaj bahaana daŭras tamen jam de la komenco de nia jarcento.



Foto: Hristo Matev

Esperantistaj bahaanoj en BELaj Tagoj (sep. 1991, Pisanica, Bulgario). Zamenhof rigardas flanken.

Aparte prosperaj estis la 20-aj kaj 30-aj jaroj. Studante la historiajn fontojn oni povas ekhavi la impreson ke tiutempe plejmulto de la bahaanoj estis konvinkitaj ke Esperanto donos la respondon al la alvoko kiun ilia profeto, Bahá'u'lláh, direktis al la gvidantoj de la mondo: “Ho membroj de la parlamentoj tra la mondo! Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj surtere kaj adoptu vi same skribon komunan. (...) Tio ĉi kaŭzos unuecon, se nur tion kapablu vi kompreni, kaj montriĝos la plej granda ilo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacian, ho ke tion vi perceptu!”

Post la Dua Mondmilito la situacio iom ŝanĝiĝis. Por la bahaanoj aliaj temoj kaj agadkampoj pli gravas. Relativigis la pozicio de Esperanto, ĉar pli klariĝis ke la baha sinteno al la demando de internacia helpa lingvo estas esence — en la vortoj de la tutmonde plej alta baha instanco, la Universala Domo de Justeco — ke “malgraŭ ĉiuj siaj kvalitoj, Esperanto eble ne estos la internacia lingvo fine elektita” kaj ke “la bahaanoj entuziasme subtenas pli la ideon de internacia lingvo ol iun specifan solvon de la problemo.”

Restis tamen kelkaj fervoruloj, precipe ĉirkaŭ Roan Orloff-Stone (tradukinto de *La profeto* de Khalil Gibran). Tiuj

vo estos, ni sentas, rekompencata per la eniro en la Kredon far multaj el viaj esperantistaj kamaradoj, kiuj tiel faros la paŝon de universaleco lingva al la pli grandaj universalecoj de unu religio kaj unu homaro.”

El tiuj vortoj facile dedukteblas ke la rilato inter la du movadoj estas foje ankaŭ problemdona: ambaŭ pretendas havi solvon por esencaj mond-problemoj. Sekve bahaanoj kaj esperantistoj emas reciproke sin konvinki kaj klopodas tiri la alian al sia flanko, ofte tamen sen preteco mem fari paŝon en ties direkto. Alivorte: la rilathistorion de la du movadoj karakterizas unuflanke aktiva propagando en la tendaro de la alia kaj aliflanke relativa rezisto de la bahaanoj esperantistiĝi kaj de la esperantistoj bahaaniĝi. Pli profunde tion prilumas la eseo *La movadoj bahaaj kaj esperanta — ĉu suspektemaj inter si samideanoj?* de Bernhard Westerhoff, enkonduka al la festlibro *Bahaismo kaj Esperanto*, kiun BEL ĵus eldonis je sia jubileo.

La adreso de Bahaa Esperanto-Ligo estas: P.O.Kesto 500133, DE-60391 Frankfurt am Main, Germanio (☎/☐+49/69/95-29-48-11; ☐BahaaELigo@aol.com).

Bernhard Westerhoff (Germanio)

Vero el disputo

Pri “Edukado al paco” temis la lasta TEJO/KER-seminario (4-11 okt., La Chaux-de-Fonds, Svislando).

Dank’ al subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo kaj la svisa Fondaĵo Renkonto 2001 (Lenzburg), kunvenis en La Chaux-de-Fonds trideko da Esperanto-parolantaj gejunuloj el pli ol dek eŭropaj landoj, plus el Kostariko kaj eĉ el Irano.

Svisaj kaj germanaj fakuloj prelegis al ili pri temoj tre aktualaj, i.a. pri juraj aspektoj de la homaj rajtoj kaj pri svisaj pioniroj de la pacismo. Dank’ al la reĝisorado de la spertaj Mireille Grosjean kaj Sabine Trenner, la seriozaj temoj estis trafe kombinitaj kun rolludoj, kiuj instigis la partoprenantojn disputi, eĉ foje tre akre. Tial ke la rolludoj helpis ĉiun malkovri siajn antaŭjuĝojn kaj ekkoni la proprajn reag-manierojn en konflikta situacio, ja ne mankis streĉaj momentoj. Sed, kiel oni diras, el disputo naskiĝas la vero.

La seminarianoj vizitis la famajn Kulturano E-Centron kaj Urban Bibliotekon, kaj ekskursis al la pitoreskaj pejzaĝoj ĉe la franca limo.

La aranĝon atentis ankaŭ ĵurnalistoj el la regiono. Opinioj de kelkaj partoprenantoj pri la homaj rajtoj, monda paco kaj Esperanto aŭdiĝis en radio, kaj raporto pri la aranĝo estis unua novaĵo de la regiona televid-programo.

Tiu ĉi seminario kreis bonegan etoson kaj amikecon. Ni danku pro tio al la perfekta organizo de Marion kaj Mario Bélsle, Mireille Grosjean, Anna Lászy kaj aliaj.

Laŭ raportoj de Jordan Velikov (Bulgario) kaj Marion Grosjean (Svislando, el Dialog’)

Helpu redoni brakojn

Sylvia, 18-jara knabino el Madagaskaro, ne plu havas brakojn: ili estis amputitaj post busa akcidento antaŭ 3 jaroj. Se vi povas iel ajn (idee, praktike, finance) helpi por ke ŝi ekhavu brak-protezon, kontaktu Asocion de Esperantistaj Handikapuloj: Jarmila Rýznarová, Na Okrouhlíku 953/21, CZ-53003 Pardubice, Ĉeĥio.

Reagoj



Plej taŭgas lerniloj tutmondaj

G. C. Fighiera (okt., p. 162) verumas la mankon de E-lerniloj por difinitaj, precipe malmulte disvastigitaj lingvoj. Nuntempe, la granda plimulto de moderna lingvoinstruado uzas nur cel-lingvajn lernilojn, plej kutime bunte ilustritajn kaj allogajn. Se tio taŭgas por eĉ la plej komplikaj naciaj lingvoj, kiom pli ĝi taŭgas por Esperanto — internaciaj lerniloj por internacia lingvo!

Plej banale, ili taŭgas ekonomie. Nia studanta komunumo jam sufiĉe modestas; se ni fragmentigas ĝin en centon (ducenton?) da laŭlingvaj eroj, des pli malrendimente estos produkti por ĉiu apartajn studilojn, precipe modernajn kiel vidbendoj, kiuj bezonas ekonomion grand-skalan por sukcesi.

Pli grave, du-lingvaj lerniloj tendencas, anstataŭ atentigi utile pri la malfacilaĵoj kaj kritikaj punktoj

de E-o por lernantoj el tiu difinita deven-lingvo, kateni la prezenton de E-o al la strukturoj kaj spirito de tiu lingvo, koste de la propraj de Esperanto mem. Presentante signifon per traduko anstataŭ per bildo, ago aŭ kunteksto, ili malfruigas la alstrebatan punkton, kiam la lernanto ekpensas kaj funkcias en la cel-lingvo.

Ni disdividu la merkaton ne laŭlingve, sed laŭ aĝ-grupoj, laŭ studmetodoj (memstudo, grupa lernado, gramatika, konversacia ktp) kaj laŭ motivoj (por turismo, kulturo, studobloj, idealoj, sociaj kontaktoj ktp). Per niaj limigitaj rimedoj ni kreu — anstataŭ modestaj, malmmodernaj kajeretoj por 258 lingvoj — dekon da modernaj, tutmonde uzebblaj cel-lingvaj instru-kompletoj, ebligante pli akcepteblan teknikan aspekton kaj provizante lernantojn per komuna ligilo. La mondo estas nia lando; niaj lerniloj havu transnacion etoson

kaj prezentu la E-vivon kaj kulturon.

Apoge, pedagogoj diverslande verku koncizajn konsilarojn kiel adapti la enhavon al la enlandaj kondiĉoj, kun plusaj ekzercoj aŭ aktivaĵoj pri punktoj aparte malfacilaj por la koncernaj landanoj. Tian pluiron UEA kaj ILEI prefere subtenu.

Stefan MacGill

(Nov-Zelando/Hungario)

Unu fojon en jardeko

La teksto "Ĉu preparitaj persvadi la mondon?" de d-ro D. Blanke (jun., p. 102) estas ekstreme interesa pro la maniero laŭ kiu ĝi evidencigas multajn el la mankoj kiuj ankoraŭ ekzistas en la tuta Esperanto-afero.

Tiaj klarvidaj, realismaj kaj senkompataj tekstoj estas maloftaĵo en niaj revuoj. Tekstoj kun tia objektiva analizo de la faktoj aperas laŭ mia konstato nur unu fojon en jardeko. Mi memoras nur du bonajn ekzemplojn el la pasintaj jardekoj: "Strategion, ne nur taktikon" de I. Szerdahelyi (apr. '76, p. 66) kaj "Esperanto ĉe la vojkruciĝo" de Z. Tišljár (jun. '90, p. 123).

Ke multaj E-aktivuloj malfacile digestas tiajn senkompatajn analizojn, montriĝas klare el la reagoj al tiuj du tekstoj (de 1976 kaj 1990). La unua eĉ akiris la privilegion esti atakata sensacie en la libro *Hamburgo en Retrospektivo* (1977) de Ivo Lapenna (p. 133), io kio pruvas ĝian ŝokan efikon.

Se la nuna teksto de D. Blanke ne elvokas reagojn, oni povas fari du sinkontraŭajn konkludojn: aŭ la nuna generacio de legantoj konsentas pri la enhavo, aŭ ili estas tro pasivaj por reagi. Mi nur esperas ke estos la unua konkludo; tio montras ke oni nun estas pli saĝa kaj pli konscia pri la vera stato de la Esperanto-afero ol en la tempo kiam oni daŭre emis konsoli sin per supertaksoj kaj blufoj.

Wim M. A. De Smet (Belgio)

Plezuriga Heroldo

Apud la riĉenhava *Esperanto* mi legas kun plezuro la novan *Heroldo*. Restante fidela al sia supertendenca informado, ĝi pliboniĝis laŭ grafiko kaj paĝaranĝo. La enhavo estas pli varia kaj diversfonta. Laŭ mi la redakcio inde daŭrigas la admirindan laboron de Ada Fighiera-Sikorska.

Leen Deij (Nederlando)

Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo

Titolo	Vendoj Prezo (gld.)	
1. Internacia Kongresa Universitato (prelegoj)	107	15,00
2. Monumente pri Esperanto (H. Rölinger, pri Zamenhof/Esperanto-objektoj)	50	18,00
3. Pocket Esperanto Dictionary (dudirekta angla-E vortaro, A. McLinen)	20	21,00
4. Saluton! (aŭtodidakta lernilo, A. Childs-Mee)	19	24,00
5. La aŭstralia pupo (noveloj, S. Štimec)	16	16,50
6. Bib la koalido: Lagotago (infanlibro de C. Eaton)	15	6,00
7. Esperanto (kompakta disko kun sintezila muziko)	15	37,80
8. Falantaj muroj (rakontoj de T. Steele)	15	24,00
9. Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj (bildstrio de Goscinny-Uderzo)	14	19,80
10. Winnie-la-Pu (A.A. Milne)	*14	27,00
11. Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI (gvidilo)	11	4,80
12. Arboj en Aŭstralio kaj suda Eŭropo (L. Giloteaux)	10	4,80
13. Jubileo (red. M. Fettes)	*10	19,50
14. L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj (A. Cherpillod)	10	10,50
15. La nova testamento	10	7,80
16. Aŭstralio, lando kaj popolo (A. Delsudo, L. Laiho, el 1927)	*9	6,00
17. Ĉu vi aŭdis, ke... (komprenekzercoj, K. Smidélusz)	9	36,30
18. Legendoj de aŭstraliaj aborigenoj (kompilis C.P. Mountford)	9	10,20
19. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (J. Wells)	*9	15,00
20. La Sankta Biblio	9	24,00
*venditaj rabate		

Kolekti kaj konservi komputile

Antaŭ kelkaj jardekoj ankoraŭ estis kutime produkti libron aŭ revuon sen komputilo. Hodiaŭ preskaŭ ĉia literaturo estas produktata komputile, do la tekstoj ekzistas dekomence en elektronika formo. Bedaŭrinde, la eldonantoj tamen ofte ne zorgas konservi la komputilajn dosierojn.

Ekzemple, dum multaj jaroj la eldonantoj de *Monato* forviŝis la tekstojn de antaŭa numero por liberigi spacon sur la sama disko por la sekva numero. Kvankam Flandra Esperanto-Ligo nun konservas siajn komputilajn tekstojn, multaj eldonejoj ankoraŭ ne zorgas pri tio. Tio estas bedaŭrinda, ĉar komputopretaj tekstoj en Esperanto povus esti tre valora rimedo por diversaj celoj:

1. *Reeldonado.* Herbert Mayer (Internacia E-Muzeo) pravas: “ĝenerale libro nur unufoje eldoniĝas”. Tamen oni ne ĉiam scias kiujn librojn oni volos reeldoni, do prefere oni konservu ĉiujn tekstojn elektronike. La decido reeldoni ja povos dependi de la ekzisto de komputila teksto. Ekz. antologio de tekstoj de iu aŭtoro aŭ pri iu temo tiel estas facile farebla.


2. *Reta eldonado.* Se iuj homoj ŝatus legi iun libron, sed ne sufiĉaj por pravigi reeldonon, eblas senpage disponigi la tekston en la komputila reto aŭ per la Tut-Tera Teksaĵo (TTT). Tiel oni kontribuas al kreskanta tutmonda publika biblioteko en Esperanto.

Eldoni libron en la reto kontraŭ pago estas malfacile, ĉar komputilaj tekstoj estas tiom facile kopieblaj, sed eblas rete eldoni revuon, se la abonprezo estas favora, kiel pravas la ekzemplo de *Eventoj*.

3. *Serĉado.* Granda avantaĝo de komputilaj tekstoj estas la eblo aŭtomate traserĉi ilin. L. Szilvási organizos la tutan arkivon de *Eventoj* tiucele, kio ebligas rapide respondi demandojn kiuj alie postulus longan foliumadon en malnovaj jarkolektoj. Ankaŭ la komputilaj dosieroj de *Esperanto* estas konservataj, sed ili ankoraŭ ne estas en facile konsultebla formo.

rojn apenaŭ povus fari tion sen uzi komputopretajn tekstarojn.

Cetere, la aplikado de tiaj rimedoj por esplori kaj priskribi la faktan uzadon ne implicas ke la rezultoj estu normigaj. Tamen, eĉ tiuj kiuj preferas alie difini la lingvon, aŭ kies lingvosento postulas ion alian ol la fakta uzado, povas profiti de ties objektiva priskribo — kaj preskaŭ ĉiam objektiva pri-



En la Literatura Kafejo de TTT (<http://www.digicron.com/kafejo>) nur la kafejo estas virtuala; literaturo tie tute realas.

4. *Leksikografio.* Serioza leksikografia laboro komenciĝas per kolekto de ekzemploj, kaj tio plej efike okazas per komputila traktado de granda aro da tekstoj komputopretaj. Eĉ la eldonejoj kiuj milionope produktas modernajn nacilingvajn vorta-

skribo estas bona bazo por normo.

5. *Aliaj aplikoj.* Komputopretaj tekstoj gravas ankaŭ por aliaj lingvosciencaj celoj kaj por evoluigi perkomputilan traktadon de homaj lingvoj. Cetere, teksto komputila estas legebla por blindulo kun taŭga ekipaĵo:

Esperanta literaturo en la Tut-Tera Teksaĵo

Hodiaŭ estas jam miloj da TTT-paĝoj en Esperanto, sed ilia enhavo plejparte ne estas literatura: sinprezentoj, mallongaj artikoloj, multaj diverspecaj listoj kaj klarigoj. TTT estas ideala rimedo por diskonigi mallongajn informojn, kiuj eble ŝanĝiĝos, sed eblas ankaŭ eldoni literaturon per TTT, kaj intertempe kolektiĝis jam rimarkebla kvanto da Esperanta literaturo.

Don Harlow penas teni aktuala (ne-ebla tasko!) grandan katalogon de tiu literaturo (<http://www.webcom.com/~donh/literaturo.html>). Lia listo pri originala literaturo havas pli ol

300, kaj lia listo pri tradukita literaturo pli ol 500 referencojn. Estas tre malfacile taksu la suman valoron de tiu kolekto, ĉar la eroj estas tre diversaj: de haĵoj ĝis tutaj romanoj; de famaj poemoj de klasikulo, kiujn iu entajpis, ĝis senpretendaj verketoj eldonitaj nur en la reto.

Inter la esperantaĵoj en TTT elstaras tri grandaj verkoj: *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertilo Wennergren, bonega alternativo al PAG, ankoraŭ ne eldonita libroforme; *Komputika leksikono* de Sergio Pokrovskij, kies reta eldono estas pli nova ol la libroforma; kaj la Biblio en E-o.

Se konsideri ke spaco sur komputila disko povas kosti malpli ol papero, la E-literatura biblioteko en TTT ne estas tro impona. La problemo estas ja la alta kosto de enkomputiligo, se oni devas reentajpi kaj provlegi ĉiun libron; tiun laboron oni emas fari nur por aparte valoraj tekstoj. Tamen eblus konservi la komputilajn tekstojn de la libroj hodiaŭ produktataj, por ke eblu reeldoni ilin en la reto post kelkaj jaroj, kiam la paperaj ekzempleroj jam sufiĉe vendiĝis. Sed por tio ja necesus iom da organizado — kion en la estonteco rekompencus la eblo disponi tre valoran bibliotekon en TTT.

ege

Kion fari por ke nia literaturo konserviĝu en elektronika formo? Ne sufiĉas ke eldonejoj konservu kaj ne forĵetu siajn disketojn, ĉar ĉi tiuj facile difektiĝas, kaj ekzistas ankaŭ alia problemo: la teknologio konstante ŝanĝiĝas, tiel ke povas esti malfacile legi disketon kiu aĝas eĉ nur dek jarojn. Pro la konata malrapideco de la Esperanta libromarkato, la disketo povus iĝi nelegebla antaŭ ol la libro elĉerpiĝos en ĉiuj libroservoj! Tamen la eldonejoj verŝajne ne volas tuj publikigi siajn tekstojn elektronike, do oni bezonas ian instancon kiu akceptos la freŝajn elektronikajn tekstojn, gardos ilin sekure, zorgante pri savkopioj kaj migrado al novaj datenportiloj, disponigante ilin tamen nur al rajtigitoj.

Oksfordo akceptas E-tekstojn

Bonŝance ŝajnas ke esperantistoj ne devos krei sian propran deponejon por tio, ĉar la ŝtate subtenata Oksforda Tekst-Arkivo (OTA: <http://ota.ahds.ac.uk/>) pretas akcepti tekstojn kaj disponigi ilin laŭ la deziro de la deponinto: plej strikte oni povas permesi disponigon de la teksto nur kun skriba permeso de la deponinto; malplej strikte oni povas permesi tute liberan aliron. Meza kategorio, kiu taŭgus por multaj Esperantaj tekstoj, estas ke oni permesas disponigon de la teksto nur por esplorado: por ricevi kopion petintoj devas subskribi interkonsenton pri tio. Kompreneble, tekston deponitan laŭ strikta kondiĉo la deponinto poste povos "liberigi".

Esperanto ankoraŭ ne estas inter la trideko da lingvoj en la katalogo de OTA, sed ĝi devus baldaŭ aperi, ĉar la Arkivo ĵus akceptis komputilan eldonon de la romano *Fajron sentas mi interne* de Ulrich Matthias. Tiun tekston mi speciale konvertis al la preferata normo TEI Lite, parte por mem spertiĝi pri tiu normo. OTA ne postulas ke deponitaj tekstoj konformu al tiu specifa normo, tamen devas esti klarigoj pri la prezentado de la teksto, kaj gravas por la estontaj uzantoj ke tiuj klarigoj estu bonaj. Pro tio mi konsilas al Esperantaj eldonejoj, kiuj espereble jam konvinkiĝis ke ja gravas konservi la komputilajn tekstojn, kontaktiĝi unuavice kun mi.

Edmund Grimley Evans (Britio)

Edmund.Grimley-Evans@cl.cam.ac.uk

Formuli movadan libropolitikon

Antaŭ precize 70 jaroj, sur la paĝoj de ĉi revuo la tiama prezidanto de UEA, Edmond Privat (1889-1962), popularigis la ideon pri Tago de la Esperanta Libro en la aniverso de Zamenhof, kiun la hungaro Gyula Baghy (1891-1967) lanĉis en la samjara, 19-a UK en Dancigo.¹

Eble nul alia moro (krom la kongresaj pilgrimoj mem) tiel forte enradikiĝis nia-movade kiel ĉi propono. Senŝanca restis alia sugesto de Nikolaj Hohlov (1891-1953) ke ankaŭ la morto-tago de Zamenhof (la 14-a de aprilo) dediĉiĝu al la originala literaturo.²

Se tiam — ĝis hodiaŭ — la ĉefa atento celis vendon de libroj, nun, en la jaro 110 p.U.L.³ jam venis la momento ne nur enpopoligi niajn librojn, sed formuli ian movadan libro-politikon. Per disdrivaj tendencoj ĉi-terene ni riskas ke la eldonado okazas tro iele-trapele, sen plano kaj sistemo, per nenecesaj duoblado, pirataj represoj kaj ignorado de aŭtoraj rajtoj. Ĉio ĉi koncernas la eldonadon de novaĵoj (originaloj kaj tradukoj), sed eble eĉ pli la rehavigon de historiaj materialoj, sen kies dispono ni riskos ne nur kompletan kontinuo-perdon, sed ankaŭ analfabetigon de la nunaj esperantistoj kaj bazo-mankon por laboro esperantologiaj.

Guto en oceano

Ni vidis en la pasinteco la faksimilan represon i.a. de *Literatura Mondo* (1922-1926, 1931-1938, 1947-1949), de la fruaj jaraloj de *Lingvo Internacia* kaj *L'Espérantiste*, same kiel de la inkunabloj (1887-1899) en la brila *Ludovikologia dokumentaro*. La eldonejo Olms rehavigis al ni la tutan *La Esperantisto* (1889-1895) kaj planas la represon de la grava Volapük-periodaĵo *Rund um die Welt* ("Ĉirkaŭ la mondo", 1888-1892). Sed ĉio ĉi estas guto en oceano. Ne nur bibliotekistoj scias ke multajn librojn kaj revuojn minacas disfalo pro mizera kvalito papera. Savi ĉi trezorojn de definitiva pereco estas urĝa kaj nepra devo de la nuna movado.

Gigantas la tasko. Ĝuste tial la movadaj responsuloj kune kun la eldonistoj devus analizi la situacion kaj starigi komunan laborplanon kaj taskodividon. UEA povus doni la kunordigan kadron kaj mem kunagi.

Jen kelkaj proponoj kaj sugestoj:

1. Ni rebezonas la jarkolektojn de *Esperanto*, *Heroldo* kaj *Sen-naciulo*. Precipe la komencan periodon konas nur manedo da specialistoj.
2. Ni rebezonas gravajn dokumentojn: Esperantista Dokumentaro, jarlibroj (UEA, SAT, Akademio), bibliografioj kaj katalogoj.
3. Ni rebezonas literaturajn revuojn (*La Revuo*, *Literaturo*, *Malgranda Revuo*, *Norda Prismo* k.a.) kaj la revuojn de la laborista movado (*La Nova Epoko*, *Sennacieca Revuo*).
4. Ni rebezonas la plej gravajn landajn organojn kaj fakajn revuojn.

Por ĉio ĉi la plej taŭga maniero estas faksimila eldono, al kiu devus aldoniĝi scienca postparolo (kun analizoj, enordigoj, apreco kaj interpreto).

Mi certas ke inter la legantoj de ĉi tiu revuo troviĝas almenaŭ centoj kiu pretas helpi en la realigo de ĉi vast-ampleksa projekto per antaŭmendo, aĉeto kaj mecenateco.

Tiele, iom post iom, la nun fantomaj sedimentoj kaj substratoj de nia lingvo estos ree alireblaj, ties ercoj kaj oroj ĝueblaj kaj studeblaj. Rehavigi nian paseon kaj ĝin prezenci kunhelpos pli firme masoni la futuron.

Reinhard Haupenthal (Germanio)

NOTOJ

1. Edmond Privat: "La ideo de Julio Baghy". En *Esperanto* 23.1927: 328 (12), p. 213.

2. N. Hohlov: "La 14a de Aprilo — Tago de la Originala E-a Literaturo". En *Germana Esperantisto* 25.1928: 3 (385), p. 35-36; repr. en: *Ilitis-Letero* 4.1995: 1 (7), p. 60.

3. p.U.L. = post la Unua Libro.


GLOSOJ

aniverso = datreveno (*Neologisma glosaro*)
jaralo = jarkolekto (-al': "PIV-sufikso adjektivsubstantiviga... kvazaŭ ia nepersona paralelo de -ul'" — Piĉ)

manedo = manpleno (-ed': "sufikso kiu montras ke temas (...) pri la kvanto entenata en [io], pri enhavo de [io]" — Piĉ)

nul = neniu (*Neologisma glosaro*)


Recenzoj



Kontribuo al kulturota kampo

Pajleroj kaj stoploj. Elektitaj prozaĵoj. William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 6+342p. 21cm. 42,00 gld.

Ŝajne misgvidas la titolo de ĉi libro, enhavanta artikolojn aperintajn tra la jaroj dise en magazinoj. Sed nur ŝajne. Pajleroj kaj stoploj el ĝenerala vidpunkto ja estas malgravaj restaĵoj de ĉefa kultivaĵo. Tamen, ekologie tiuj restaĵoj estas ege gravaj; ili reenkorpiĝas en la grundo, kaj iliaj elementoj kontribuas al la pliriĉiĝo, al la novala fekundeco de kulturota kampo. Espe-reble tiel same efikos ĉi kolekto sur la Esperanta lingvo-kampo, riĉigante ĝin per siaj ekzemploj kaj konsiloj, prepare al fruktodona kreskaĵaro liveronta sanan kaj abundan rikolton.



William Auld

Ĉirkaŭ trionon okupas "Eseoj", ĉiu el ili vera lekcio pri iu gramatika aŭ literatura punkto, ekz. bonega super-rigardo pri niaj prozaĵ tradukoj; ankaŭ ne mankas tiuj rivelantaj la filozofian sintenon de Auld fronte al la vivo kaj al niaj misjuĝantoj. Inter la sep "Rakontoj" troviĝas la perfekta satiro *Ĉu li venis utopien?* "Tradukoj" (prozaĵ), kiu okupas plian trionon de la kolekto, enhavas la klasikan *Pri metriko* de Ezra Pound. Ege grava estas la lasta parto: "Libro-kulturo", konsistanta el recenzoj kiel ili devas esti verkita: neniu superlaŭdo nur ĉar temas pri Esperanta literaturaĵo, neniu "erumado" — kiel li mem nomas la ĉikanadon de malica kritikanto —, sed ekvilibre sobra juĝado pri la trafoj kaj maltrafoj de la aŭtoro. (Pardonu la kontraŭ-diron, sed malgraŭ Ŝerloka lupeado, ĉi tie mi trovis neniun maltrafon.)

Feliĉe, ĉiuj ĉi verkoj, ofte ne plu alireblaj, estas nun kolektitaj en unu sola volumo, kiu devas fariĝi nokto-tabla konsultlibro de ĉiu Esperanta literaturisto.

Leopoldo Knoedt (Brazilo)

EL MIA KABINETO: 1953–55

NOTOJ POR MIA BIOGRAFIOTO

Mi legis lastatempe, en recenzo pri biografio de konata poeto: "Ni scias per liaj leteroj, ke Rilke estis singarda kaj evitema amanto; tamen li profunde komprenis la amon."

Mi supozas, ke unu el la avantaĝoj de tio, ke mi verkas internacilingve, estas, ke tre verŝajne neniu post mia morto legos miajn leterojn kun aŭ sen la celo fari asertojn pri mia karaktero. (Tia persono konstatas ĉefe, ke mi estas tre vortŝpara kaj malakurata korespondanto.)

Unue, eĉ se mi fariĝus la plej grandioza internacilingva poeto, la internacilingva publiko ĝenerale ne konstatus tion, nek interesiĝus pri la fakto.

Due, eĉ tiuj, kiuj konus mian nomon, ne legus miajn poemojn.

Trie, eĉ tiuj malmultaj, kiuj legus ilin, tute ne koncernus sin pri la homo, kiu verkis ilin.

La du-tri esceptuloj verŝajne jam konas min persone, kaj scias, ke mia karaktero estas sufiĉe seninteresa.

La supraj faktoj, kvankam vere iom ĝenaj dum mia vivo, post mia morto certe ĝojigos min. Estus tre bele, se ankoraŭ nenaskitaj generacioj pilgrimius al mia tombo, se mia nomo estus menciata en ĉiuj kulturaj rondoj de la internacilingva movado — aŭ en la lernejoj de la tuta mondo, se nia afero jam venkis —, se iu nekonata junulo legus miajn poemojn adorante kaj inspirate antaŭ ol sin turni denove al daŭrigo de sia poezia laboro; sed aliflanke mi ne povus ripozi en paco, se mi scius, ke seriozmienaj esplorantoj trafos miajn aferojn — leterojn, taglibrojn, poemojn, artikolojn — por anonci profesore al furoravida publiko: "Malgraŭ lia eterna temo, li estis eŭnuka"; aŭ: "Kvankam li aspektis tre vira, lia edzino lin ofte batis."

Post la apero de Kvaropo, mi jam iomete konstatis, ke la plej bonintencaj legantoj povas atingi plej malpravajn konkludojn. Al pli ol unu tre afabla korespondanto, kiu laŭdis miajn poemojn kaj poste petis la adreson de f-ino "Anna", mi devis klarigi, ke, se ie ekzistas tia persono, mi devos akuzi ŝin pri plagiato kaj lezo de kopirajto, ĉar mia Anna estas nur simbolo — eĉ ne simbolo de persono, sed simbolo de ideo, simbolo de tuta epoko kaj de tuta filozofio. Sed min konsternas la penso, ke iu esploranto povas aserti sen kontraŭdiro: "La originalo de 'Anna' estis iu f-ino X, kiun Auld ofte vizitis dum la jaro 19—," — tio min tremigas, eĉ se tiam mia edzino jam ne povos bati min pro liaj fuŝasertoj.

Aliflanke, se ekzemplero de lia traktato-biografio atingus la elizeajn kampojn, mi certe ĉerpis el ĝi tre multe da amuzo. Ĉar mi kiel eble plej malmulte skribas leterojn, kaj tute ne taglibron, mia biografiisto sin turnus por siaj "faktoj" ĉefe al miaj poemoj, kaj el tiu fonto, kian malĝustan karakteron li povus konstrui por mi!

Ĉar jen la sekreto de miaj verkoj: multaj poetoj "ĝeneraligas siajn personajn spertojn"; mi, kontraŭe, personigas miajn ĝeneralajn spertojn.

Mi estas observanto, ne partoprenanto. Miaj poemoj estas simbolismaj, filozofiaj. Sekve, kara biografinto, kiu feliĉe ne ekzistos, ili malmulte helpas vin kompreni miajn agojn.

Estas do bone, ke la internacilingva publiko ne interesiĝas pri sia literaturo, ankaŭ ne pri siaj verkistoj. Neniu publiko tiel rapide forgesas siajn verkistojn.

Kiu estis Stanisław Zygmunt Braun?

Respondu, kara leganto, se vi povas. . .

El Pajleroj kaj stoploj, p. 80-81

Origine: Heroldo de Esperanto 1198, 10 (16 junio) 1954, p. 2

Pli profundas amo ol klero

Klera edzino (1944). Upendronath Gangopaddhae (1881-1960). El la bengala trad. Probal Daṣgupto. Serio Oriento-Okcidento n-ro 29. Pisa: Edistudio, 1995. Bind. 22 cm. 182p.

Jen am-romano sur fono de lingva (mal)supereco en kolonia Hindujo: Dibakor, juna bengala aristokrato de la unua jarcent-kvarono, rifuzas plu kleriĝadi post tri fiaskoj abiturientiĝi kaj decidas neniam edziĝi al abiturientiĝinto. Post rapida enamigo al panga-ba knabino, Ĝuthika, li edzinigas ŝin sen scii ke ŝi magistriĝis pri angla literaturo. Post malkaŝigo Dibakor tamen eĉ ekfieras pri ŝi, sed baldaŭ ekestas problemoj pro la klero-diferenco. Ĝuthika, kiu profunde amas Dibakor,

ĉiel klopodas eviti neeviteblon, sed fine li eksplodas, malgraŭ am-reciproko. Tio kondukos ŝin al dolora forofero, diskutado, disiĝo, ekjaluzo... tamen ĉio kuros al feliĉa fino, eble ĉar pura amo ĉion venkas. Jen ŝlosilaj vortoj de Dibakor: "... la malkongruo de klereco estas la plej grava tipo de malkongruo. La scio estas afero ena kaj ne ekstera. Neniu povas ene malaltigi sin. Tial klerulo povas senti al stultulo kompaton, helpemon, eĉ sindonan respekton — sed ne amon."

Ĉiuj roluloj nekredeble ĝentilas kaj bonkoras, preskaŭ sirope: ofte homoj ne interparolas, sed interfloras — krom simbolanto de klaĉemo, kiu ja randas fiecon. Ne nur roluloj, kies pensoj kaj rezonadoj iom tro similas inter si, sed ankaŭ intrigo kaj ceteraj roman-eroj vidiĝas skemaj kaj tro simplaj. Tial ĉi libro ne plialtigis la bengalan literaturon en miaj okuloj.

Mi tamen tre ŝatis la konstantan aperon de belaj, originalaj metaforoj kaj komparoj, plej ofteigitaj al naturo. Aperas ankaŭ plaĉaj parolturnoj kaj vort-ludoj trafe esperantigitaj de Daṣgupto: lia redono elegantas per klasika Esperanto tra la tuta verko.

Antonio Valén (Hispanio)

Fundamentaj demandoj pri la homo

Du verkoj de Arkadij (1915-91) kaj Boris (1933-) Strugackij: **Pikniko ĉe vojrandoj** (1971). El la rusa trad. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 1996. 190p. 20cm. 19,80 gld. **Malfacilas esti dio** (1964). El la rusa trad. Aleksej Ĵuravljov. Moskvo: Impeto, 1992. 168p. 20cm. 15,00 gld.

La fratoj Strugackij estas la internacie plej konataj sovetiaj sciencfikciaj aŭtoroj, kaj en eksa Sovetio ĉiam novaj generacioj de legantoj malkovras la raven de iliaj romanoj. Multaj el ĉi tiuj estas aparte popularaj inter gejunuloj, kiuj verŝajne ofte legas ilin kiel simplajn aventur-romanojn. Tamen ilia temaro estas serioza kaj ebligas multnivelan interpretadon — tiel ankaŭ *Pikniko*.

La scenejo de la romano estas la Zono, regiono transformita ĝis nere-koneblo post vizito de eksterteranoj kaj strikte gardata. Ĝin esploras sciencistoj kaj kontraŭleĝe ekspluatas ankaŭ "stalkeroj", kiuj spite la teruraĵojn elportas kaj vendas utilajn objektojn postlasitajn de la vizitintoj.

La streĉa intrigo samtempe starigas multajn fundamentajn demandojn pri la homa naturo. La eksterteranoj kompreneble alegorias la senpripen-san homan civilizon, aŭ eĉ Dion. Neniu scias ĉu la Vizito fakte havis iun celon, aŭ ĉu la Vizitintoj entute rimarkis la homojn. Eble temis nur pri ia hazarda pikniko ĉe kosma voj-rando — post kiu la veturantoj lasis siajn rubaĵojn kaj pluveturis, eĉ ne pensinte ke la vizito povas tute ŝanĝi la sorton de la homaro.

La traduko de Bronŝtejn estas eble eĉ tro fidela — ofte oni povas laŭvorte

retraduki en la rusan, kaj foje aperas parolturnoj malfacile kompreneblaj sen ruslingva scio, ekz. "Okuloj miaj ilin ne rigardus!" (p. 21). La ruseca vortordo foje malhelpas la legadon: nekutima ordo ja povas funkcii kiel stila rimedo, sed oni uzu ĝin nur kaze de nepra bezono, ne tra tuta libro.

Jam en 1992 aperis ĉe la sama eldo-

nejo alia libro de la fratoj Strugackij, *Malfacilas esti dio* (trad. A. Ĵuravljov). Ankaŭ tie ofte ĝenas klare sentebla ruslingva influo, sed krome Ĵuravljov de tempo al tempo eĉ gramatike eraras. Tipe por rusaj esperantistoj, li ofte uzas "por" anstataŭ "por ke".

La intrigo en ambaŭ kazoj rapide fortiras la atenton de la finfine ne tro ĝenaj lingvaj malgataĵoj. Impeto meritas laŭdojn pro tio ke jam du verkoj de mondfama aŭtoro estas akireblaj por la esperantlingva publiko. Tamen eble indus venontfoje kontroli la tradukon al kompetenta alilingvano.

Kalle Kniivilä (Finnlando/Svedio)

Tutmonda rigardo

Kulturo kaj teknologio. Andrew O. Urevbu. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 63p. 21cm. 15,00 gld.

La periodon 1988-1997 Unesko deklaris Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. La celo estis interalie estigi pli da kompreno pri la kultura dimensio de evoluoprocezoj. Pri tio temas ankaŭ tiu ĉi atentinda libreto. Traktante la rilatojn inter kulturo kaj teknologio (ĉi lasta difinita kiel la "sistema apliko de diversaj branĉoj de homa scio al praktikaj problemoj"), ĝi donas ekzemplojn el malsamaj socioj, industriaj kaj evoluantaj. Ni legas

pri la reagoj de diversaj landoj al la problemoj de moderna teknologio en la ĉiutaga vivo — jen okcidenta Eŭropo, Usono kaj Sovetio, jen Japanio kaj Ĉinio, jen la evoluantaj landoj, al kiuj lastaj oni kutimas atribui aparte fortan kulturan streĉitecon pro la konflikto inter indigenaj kaj modernaj teknologioj. Ĉar la aŭtoro estas afrikano, li ne nur instruas al ni multon pri la afrikaj socioj, sed ankaŭ helpas nin akiri pli "tutmondecan" rigardon al la rolo de kulturo en teknologia evoluo. Feliĉe, do, ke dank' al UEA la verko de Urevbu estas nun havebla en — bonega — Esperanta traduko.

Ulrich Lins (Germanio)



Enorme kreskas la sci-malsato


Zamenhof kaj judismo. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1997. 61p. 21cm. 18,00 gld.

En la komenca periodo de Esperanto oni devis diplomate kaŝi ke la aŭtoro de Esperanto estas judo. Cherpillod montrasklare kaj elokvente — multe pli emfaze ol ĉiuj aliaj — ke la universaleco kaj ĝenerala homaranismo de Zamenhof rekte fontas el liaj judeco, hebrea eduko kaj la malfeliĉa sorto de lia gento. La aŭtoro brile kaj konvinke spuras por ni diversajn lokojn en la hebrea tradicio kiuj eventuale rekte ligiĝas al Esperanto. Aparte konvinka kaj filologie plej valora estas la parto pri la influoj de la jida lingvo al Esperanto. Rilate la influojn hebreajn Cherpillod sonas iom malpli konvinke, kaj pri la novhebrea li baziĝas ĉefe sur hagiografiaj mitoj pri Ben Jehuda — kies lingvokrea rolo tamen estis ŝajne multe pli simbola ol efektiva. La (nov)hebrea lingvon (re)naskis fakte la popolo, ne iu individuo. Sed la paraleloj kun E-o formas interesan parton de la libro.

La libro parolas kun kortuŝa varmo pri la personeco kaj etika profilo de Zamenhof. Indas relegadi tiujn paĝojn por trinki el fonto de aŭtenta esperantismo — malgraŭ nekonsekvenceco kun kvazaŭaj klopodoj de la aŭtoro, en antaŭaj ĉapitroj, defendi iujn tre obskurajn principojn, ekz. la historian rajton de iu gento je teritorio. Oni ja persekutis judojn ĝuste surbaze de tia teorio. La senrezerva subteno de Zamenhof al la cionisma idearo kaj lia samtempa subtila rezerviĝemo pri la

naciismo cionisma estas logika sinteno: li ja kredis ke lando devas aparteni al ĉiuj siaj filoj egale, ne ekskluzive al unu gento pro iuj historiaj rajtoj.

cepto kun multaj komunaj punktoj kun Esperanto. Ĉu Zamenhof mem estis framasono? Verŝajne ne, diras Cherpillod. Tamen, almenaŭ en la libro *Framasonismo ĉe kroatoj* de V. Mužić Zamenhof aperas sur listo de famuloj framasonaj. Ĉu tiu informo estas fidinda? Kaj se jes: kion novan ĝi klarigas al ni? Nu, ĉiukaze, Cherpillod



Poemoj de Zamenhof en la jida lingvo (1879)

Cherpillod ne sukcesis kapti tiujn kaj iujn aliajn subtilojn de la Zamenhofa animo. Krome, en sia pasia argumentado li plurloke neglektis senpartie kaj dece konsideri aliajn konvinkojn aŭ pensofluojn — tre malzamenhofe, eble eĉ ofende por iuj. Tamen, lia sincere bona intenco pli ol evidentas.

Interesa parto traktas la rilaton de hilelismo/homaranismo kun la framasonismo, alia universalisma kon-

malfermas ankaŭ tiun ĉi temon, kiu helpas nin aliri la genezon de nia spirita tradicio ene de aliaj universalismaj konceptoj.

La granda valoro de tiuj ĉi 60 paĝoj ekscitaj, emoci-donaj, intelekta defiaj, belstilaj kaj pasiaj estas ke ili instigas kaj motivas al esploroj en multaj direktoj. Kaj kreskigas la sci-malsaton enorme. Brila libro, leginda nepre.

Nikola Rašić (Nederlando)

Ŝpruca maldeco de juna talento

Pli ol homo, esperantisto! La d-ro Senesperanto kaj la alternativa lingvo kaj La romantikulo en la 20a jarcento. Arnau Torras Tutusaus. Zagreb: SEK, 1996. Po 48p. 30cm. Po 12,90 gld.

Ofte oni aŭdas plendojn ke “ne eblas maldeci per artefarita lingvo” aŭ la fifama “ne eblas amori Esperante”. Arnau, desegnisto de bildstrioj (aŭ komiksoj) bonege refutas tiajn asertojn per siaj verkoj, kiuj profunde maldecas kaj ĉefteme traktas amoron aŭ — eĉ pli ĝuste — fikadon. Tiuj kiuj opinias ke la Esperanta kulturo tro sekas, povas malkovri en la koncernaj komiksoj multajn fluojn homajn kiuj gutas aŭ ŝprucas el ĉiuj eblaj korpompartoj.

Arnau prunteprenas ideojn kaj stilojn de antaŭaj majstroj de la komiksarto, kiel Crumb, Shelton kaj Leonardo da Vinci. Sed tute ne temas pri ŝtelado, ĉar li omaĝe citas la fonton. Tiu ĉi omaĝa prunteprenado montras ke Arnau daŭre evoluigas sian stilon kaj ĝenerale sian arton.

Plaĉegas al mi la plena manko de perforto. Malgraŭ la fakto ke Arnau celas ŝoki la leganton, li ĉiam uzas ĉi- cele bugradon kaj fekaĵon kaj tute evitas pafilojn kaj sangon.



Unu relative deca desegno de Arnau

Enviinda pedanteco

L.L. Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1997. 32p.

Ĉi tiu broŝuro laŭaspekte ne estas inter la plej allogaj Esperanto-eldonaĵoj. Samkiel nia unua libro aperinta ĝuste antaŭ 110 jaroj. Tamen la konantoj de la Cherpillod-verkoj scias ke la neprofesia aspekto pariĝas kun enviinda pedanteco, kiu igas la enhavon alloga kaj vorinda.

La kajero dividiĝas en tri partojn: la ĉefaj datoj de la vivo de Zamenhof; liaj dek du pseŭdonimoj; lia horoskopio. Aldoniĝas bibliografio de la verkoj supozeble uzitaj de la aŭtoro. La unua parto komenciĝas la 8-an de feb. 1837 en Tykocin kaj finiĝas la 6-an de aŭg. 1959 en Bjalistoko. En ĝi svarmas datoj, eventoj, lokoj, nomoj rilataj al L.L. Zamenhof aŭ liaj proksimumoj, plej ofte — laŭ la tradicio de Cherpillod — kaj en esperantigita formo kaj en la originala lingvo. En la dua parto troveblas ĉiuj konataj pseŭdonimoj de Zamenhof, de Gamzefon ĝis Dr. X, kun referencoj dataj kaj lokaj, kaj kun klarigoj. En la horoskopio la aŭtoro eksplikas la pozicion de la diversaj astroj en la tagoj de la naskiĝo kaj morto de Zamenhof kaj je la apero de la Unua Libro, kaj ilian eventualan rilaton kun Zamenhof.

Jen libreto el kiu oni povas ĉerpi multe da informoj pri la iniciatinto de nia lingvo, kiujn, ve!, tiom multaj samlingvanoj niaj prifajfas.

Ionel Oneț (Usono)

La plej grava problemoj rilate la du librojn estas ke tamen mankas iu el-laborita intrigo aŭ historio. Temas plejparte pri unuopaj desegnaĵoj mempriskribaj pri la aŭtoro kaj pri liaj aventuroj (revoj?) seksaj. Sed tiuj ĉi komiksoj aperis origine en la revuo (Arnau nomas ĝin "revujo") *Kata Luno*, do ili pro tio devis esti mal-longaj. Mi esperas ke Arnau en siaj estontaj verkoj celos pli longan formaton kun bone ellaboritaj karakteroj kaj interagoj pli profunde dramaj. Kiam lia arto maturiĝos, tiuj ĉi tre fruaj komiksoj estos valoraj spuroj de juna talento. Kaj nun ili bone montras ke la Esperanta junulara kulturo ja viglas.

Miko Sloper (Usono)

Laste aperis



Aŭstralia pupo, La. Spomenka Štimec (1949). Dulingva. En la anglan trad. Will Firth. Zagreb: Kroatia E-Ligo, 1997. 63p. ISBN 953 96918 1 8. 20cm. Kvar noveloj pri kroataj enmigrintoj en Aŭstralio. 16,50 gld.

Eŭro. Ecoj kaj sekvoj por ĉiuj. Marc Vanden Bempt (1956). Leuven: Esperanto 2000 – Flandra E-Ligo, 1997. 52p. ISBN 90 71205 68 1. 21cm. Avantaĝoj kaj problemoj de la estonta eŭropa mon-unuo. 7,80 gld.

Herkus Mantas. Kvinakta tragedio (1957). Juozas Grušas. El la litova trad. Palmira Lukoševičienė kaj Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo Revo, 1997. 79p. ISBN 9986 496 03 9. 21cm. Pri nacia heroo el la 13-a jarcento. 15,00 gld.

Infaneske. Rimis Leen Deij (1919); skizis Lilli Giloteaux. Croix: L. Giloteaux, 1997. 46p. 21cm. 35 spritaj poemoj por infanoj. 7,50 gld.

Internacia Kongresa Universitato. 19-26 julio 1997, Adelajdo, Aŭstralio. Rotterdam: UEA, 1997. 73p. 29cm. Kompletata prelegaro (Fox, Gates, Lee, Steele, Wells, La Torre, Bishop). 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Konciza gramatiko de Esperanto / Kratkaja grammatika esperanto. Aleksandr Korjenkov (1958). Jekaterinburg: Ruslanda E-isto, 1997. 15p. 20cm. Ruslingva. 3,60 gld.

Kulturo kaj teknologio. Referaĵo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo. Andrew O. Urevbu. El la angla trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 63p. ISBN 92 9017 053 0. 21cm. (Vd. recenzon sur p. 213.) 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Ni parolu esperante. Konversacioj por turistoj. Telesforas Lukoševičius. Panevėžys: E-Klubo "Revo", 1993. 61p. ISBN 9986 496 00 4. 21cm. Esperanta-litova. Laŭtemaj konversacioj, modelaj leteroj, gramatika skizo kaj vortareto E-litova. 9,00 gld.

Pajleroj kaj stoploj. Elektitaj prozaĵoj. William Auld (1924). Rotterdam: UEA, 1997. 6+342p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Kolekto de tiuj eseoj, rakontoj, prozaĵ tradukoj kaj recenzoj de Auld kiuj ĝis nun ne aperis libroforme sed "havas valoron pli ol nur efemeran". (Vd. recenzon sur p. 212.) 42,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Paroladoj de d-ro L.L. Zamenhof. Komp. KAWANISI Teturō kaj MINE Yositaka. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1997. 147p. ISBN 4 930785 05 7. 21cm. Laŭ la originalaro de Ludovikito, kun korektoj surbaze de la samtitola kompilaĵo de Sasaki T. — Iwasita Z. (1932). Kun detala postparolo de Kawanisi. 18,60 gld.

Pentolaboro. Ekzemplo de japana komunumo nomita Ittoen. Jerusalema: Centro Sivron, 1997/5757. 15p. 21cm. La vivo de estro de japana religia komunumo. 3,30 gld.

Poeziaj pejzaĝoj, La. Poetyckie pejzaże.

Div. aŭtoroj. Red. Grażyna Maszczyńska-Góra kaj Olimpia Napierska-Kolarz. El la pola trad. Lidia Ligęza. Krakovo: Espero, 1996. 148p. ISBN 83 901363 8 4. 22x23cm. Kvarlingva: angla, E-a, franca, pola. Poemoj de bazlernejoj, ilustritaj per fotoj kaj bildoj de liceanoj el la Krakova regiono. 22,50 gld.

Policy for Esperanto, A. Andrea Chiti-Batelli. El la franca angligis Diccon Masterman. Rotterdam: UEA, 1997. 19p. 22cm. Esperanto-Dokumento 44A. Pledo por tuja ekago kontraŭ lingva hegemonio. 4,80 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Ŝtonetoj Barlastonaj. Rakontoj, eseoj, informoj. Red. Arnold Pitt. Barlastonanaro, 1997. 26p. 21cm. Plej diversstaj kaj -stilaj prozaĵetoj de partoprenintoj en progresigaj kursoj Barlastonaj (Britio). 4,50 gld.

Tabelo, La. Gbeglo Koffi (1957). Rotterdam: Fondajo Afriko de UEA, 1997. 52p. 30cm. Pri la tabelvortoj: uzado kaj problemoj. 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Tendaraj tagoj. Kajero 2 (dua reviziita eldono). Stefan MacGill (1948). Budapeŝto: ILEI/UEA/HJEA, 1997. 72p. ISBN 963 04 2095 3. 29cm. Ilus. Pavel Rak. Situationskomunikala lernolibro por lernantoj inter 10-kaj 14-jaraj. 15,00 gld. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Trigamba Joĉjo. Jack Vance. El la angla trad. Ĝan Starling. Kalamazoo: Mistera Sturno, 1997. 71p. 22cm. Sciencfikcia novelo, per kies teksto distre kaj grade instruiĝas la "ŝava", skribsistemo evoluigita laŭ testamentaj dispozicioj de Bernard Shaw, nun adaptita al Esperanto. 6,00 gld.

Zamenhof kaj judismo. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1997. 61p. ISBN 2 906134 41 4. 21cm. Monografieto pri ĉiuj aspektoj de la temo: cionismo kaj antijudismo, hebrea kaj jidaj influoj al Esperanto, hilelismo kaj homaranismo ktp. (Vd. recenzon sur p. 214.) 18,00 gld.

DIVERSAĴO

Gratulkarto por festotagoj. 15,5x10,5 cm. Plenkolora duobla karto kun la mesaĝo "Korajn bondezirojn" en E-o, france, angle, germane, nederlande. Kun adekvata blanka koverto. Kompletato de 10 kartoj: 16,50 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



• Hungario:

Esperantistoj kolektas imposton

Kiel raportite (marto, p. 57), ĉi-jare fariĝis eble por hungaroj laŭplaĉe disponi pri 1% de sia laŭenspeza imposto favore al organizoj neprofitcelaj. El ĉi tiu fonto Hungara Esperanto-Junularo ricevis 19 mil, Hungaria Esperanto-Asocio (HEA) 295 mil, Fondaĵo Esperanto de Kultura E-Asocio (KEA) 580 mil forintojn (HUF; 100 HUF = ĉ. 1 gld.). Kadre de la pasintjara "kampanjo por la 1%" HEA elspezis 8 mil HUF por presi informfoliojn, dum KEA investis 300 mil HUF por presigi kaj disdonigi ĉ. 20 mil flugfoliojn pri la lingve kaj kulture imperisma rolo de la angla lingvo. El tio sekvis ankaŭ pluraj intervjuoj en televido kaj radio, kaj fojaj mencioj ke esperantistoj estas inter la "protektantoj de la hungara lingvo". Ĉi-jare la



Sur teraso de Zagreba hotelo vicurbestrino Dorica Nikolić (maldekstre) tostis ĉampane kun esperantistoj. (Vd. "Kroatio").

tri Esperanto-organizoj traktas pri komuna kampanjo. (*Eventoj*, L. Szilvási, O. Princz)

La financa rezulto estas bona, se konsideri ke nur al 27% el la ĉ. 16 mil organizoj konkurencintaj por la elimposta subteno estis atribuita sumo de pli ol 100 mil HUF.

• Japanio: Donaco je miliono

La 90-jara SASAKI Hisako donacis milionon da enoj (preskaŭ 16 mil gld.) al Japana E-Instituto. Ŝi estas la tria filino de la Esperanto-pioniro OKA Asazirō, kiu kreis sian internacian lingvoprojekton Zilengo ĉirkaŭ 1890. (*La Revuo Orienta*)

• Jugoslavio: Tutlanda novaĵo

Preskaŭ ĉiuj gravaj landaj gazetoj kaj unu televidstacio raportis ke la premio "Infanlibro de la Jaro" en la Belartaj Konkursoj de UEA estis aljuĝita al la serba esperantisto Zlatoje Martinov pro la libro *Al la mondo donace*, kiun li kompilis. (R. Petrović)

• Kroatio: Ĉampano je alta nivelo

La Zagreba vicurbestrino Dorica Nikolić levis ĉampanglason (surbilde) al la sukcesoj de la esperantistoj okaze de nekutima festo (16 okt.), kiun prizorgis Judita Rey-Hudeček, vicprezidanto de Kroatia Esperanto-Ligo, sur tegmenta teraso de Hotelo Sheraton. Krom kvindek da esperantistoj kaj pluraj oficistoj el la kultura fako de la urbo, ĉeestis du televid-teamoj kaj kvar ĵurnalistoj. KEL-prezidanto Dalibor Brozović montris moneron kiun la Popola Banko de Kroatio baldaŭ poste emisiis en 300 mil ekzempleroj: la monero de 25 kunaĵoj portas dorsflanke la tekston "Unua kongreso de kroataj esperantistoj" (vd. jul.-aŭg., p. 125) kaj la kongresan simbolon.

El la oficejo de la urbestro intertempe atingis la Zagreban Esperanto-sidejon nova lasera printilo. (S. Štímeć)

Abontarifoj 1998 de la Libroservo de UEA prezoj en nederlandaj guldenoj

Revuo	n-roj jare	jar- tarifo	Revuo	n-roj jare	jar- tarifo
Boletín (hispana)	5	50,00	Kancerkliniko, La (ajnista)	5	42,00
Brazila Esperantisto	4	40,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		8,00
Brita Esperantisto, La	6	49,50	Kosmos (filozofia)	4	33,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		12,00	Kroata Esperantisto (aere)	6	18,00
Bulgara Esperantisto	3	35,00	Language Problems and		
Dia Regno (KEL, aere)	12	25,00	Language Planning	3	92,00
Dua Jarcento, La			<i>institucioj</i>		185,00
(Internacia E-Muzeo)	4	33,00	Lanterno Azia, La		
El Popola Ĉinio (aere)	12	63,00	(korea, aere)	11	45,00
Esperantisto Slovaka	4	40,00	Literatura Foiro	6	62,00
Esperanto, L' (itala)	9	43,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		12,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		6,00	Litova Stelo	6	22,00
Esperanto Aktuell (germana)	8	39,00	Medicina Internacia Revuo		
Esperantolehti (finna)	6	30,00	(aere)	3	25,00
Esperanto sub la Suda Kruco			Monato (novajmagazino)	12	80,00
(aŭstralia-novzeland, aere)	6	60,00	<i>aerpoŝta aldono</i>		11,00
Espero, La (sveda)	6	44,00	Norvega Esperantisto	6	22,00
Espero Katolika (IKUE)	6	60,00	Ondo de Esperanto, La		
Fonto (literatura, aere)	12	60,00	(ruslanda, soci-kultura)	12	42,00
Franca Esperantisto	11	67,00	Oomoto (religia/kultura, aere)	2	23,00
Gazeto, La (kultura)	6	57,50	Riveroj (literatura)	4	30,00
<i>aerpoŝta aldono</i>		10,00	Rok-gazet' (muzika)	4	38,00
Heroldo de Esperanto	16	62,00	(abono ne por jarkolekto, sed por 4 n-roj)		
<i>aerpoŝta aldono</i>		25,00	Scienco kaj Kulturo	6	55,00
ICEM-Esperanto			Sennaciulo/Sennacieca Revuo	12	113,00
(Freinet-pedagogio)	4	40,00	Simpozio (filozofia)	2	12,00
Internacia Pedagogia Revuo	4	30,00	Starto (ĉeĥa)	6	16,00
Jaro, La (agendo)	1	10,00	TEJO Tutmonde	4	20,50
<i>aerpoŝta aldono</i>		4,00	Tempo (kroata)	4	18,00
Juna Amiko (por lerneĵanoj)	4	19,00	Tutmondaj Scienco kaj Tekniko	4	32,00

Por mendoj de klientoj loĝantaj en Eŭropa Unio, aldoniĝas Aldonvalora Imposto je 6%.



• Agrikulturo:

Ĉinio bredas asocion

Fondiĝis Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio, kiu celas “praktiki Esperanton en agrikulturo inkluzive bredadon, hortikulturon, arbarkulturon kaj koncernajn sciencojn”. Membrokoto: 6 us. dolaroj. Estraro elektigita en marto; ĝis la 1-a de februaro oni povas sendi kandidatiĝojn kun aŭtobiografio al la sekretario-kasisto HUANG Yingbao (Jingchuan Xian Kewei, CN-744300 Gansu, Ĉinio; ☎+86/933/332-11-48), kiu ankaŭ sendas provkzempleron, kontraŭ 2 us. dol., de la 20-paĝa organo *Internacia Agrikulturo*, aperonta 3-4 fojojn jare.

• Informado:

Zamenhof ekzemplas kremon

Fuji Xerox, la tutmonde plej granda fabrikanto de kopiiloj, aperigis (20 okt.) en *Nihon Keizai Shimbun*, la plej granda ekonomia taggazeto japana, tutpaĝan reklamon pri sia inform-administrada programo DocuCity. Tamen, nur kvarono reklamis la produkton mem: duonan paĝon okupis foto de Zamenhof (disponigita de la Informa Fakto de UEA), kaj kvaronpaĝo informis pri Esperanto, kiel ekzemplo de kreema pensado.

La Revuo Orienta memorigas ke simila reklamo de la firmao Sony, kun Zamenhof-foto, aperis antaŭ deko da jaroj en usonaj ĵurnaloj — kaj ties eraroj en la E-teksto donis okazon al la Informa Fakto de Japana E-Instituto kontakti koncernan sektion de Sony.

• Katolikismo: Retpoŝta listo

Internacia Katolika Unuiĝo E-ista lanĉis retpoŝtan dissendoliston. Interesatoj mesaĝu al info.ikue-l@iml.sicoar.com. (D.C. Garcia, Interredaktore)

• Religi-komparado:

Venontjare en Jerusalemo

Jeremi Gishron (P.O.K. 23180, IL-91231 Jerusalemo, Israelo; ☎+972/2/586-62-49) invitas al la 4-a Interreligia Seminario E-ista (20-26 apr. 1998, Jerusalemo), pri “La signifo de Jerusalemo por la abrahamecaj religioj”.

• Boulton: Premiota en Aalen

Atribuota la sesan fojon en 1998, la Esperanto-Kulturpremio de Aalen — je 10 mil germanaj markoj (pli ol 11 mil gld.) la plej altsuma premio en Esperantujo — iros al Marjorie Boulton, precipe pro ŝia poezio, sed ankaŭ pro ŝiaj meritoj en cetera beletro, scienco, edukado, ĵurnalismo kaj ŝiaj kontribuoj al humaneco kaj interkompreno — decidis FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj. Boulton estas la tria virino kiun FAME premias, post Ada Fighiera-Sikorska kaj Spomenka Ŝtimec.

La premio estos transdonita kadre de solena matineo en la urba biblioteko de Aalen, probable dum printempo 1998. (S. Maul, Interredaktore)

• Nischwitz: 90-jara

Heinrich Nischwitz, germana esperantisto aktiva jam 75 jarojn, fariĝis 90-jara la 18-an de novembro. (R. Reuchlin)

• Nowakowski: Nova posteno

La ĝisnuna estro de la Eksterlanda Servo de Pola Radio, Jerzy Marek Nowakowski, ricevis altan postenon kiel vic-ŝtatsekretario pri internaciaj aferoj en la kancelario de la nova pola ĉefministro, Jerzy Buzek. Polaj televidantoj konas Nowakowski kiel multjaran gvidinton de grava politika elsendo, dum esperantistoj memoras lian partoprenon en la Tampere UK (1995), kie li prelegis al kongresanoj pri la 70-jara historio de Pola Radio. Jam alvenis la unuaj Esperantlingvaj ret-leteroj kies sendintoj gratulas al Nowakowski kaj esprimas sian esperon ke li daŭre subtenos la elsendojn al eksterlando, speciale tiujn en Esperanto. (A. Pettyn)

• De Seabra: Pluraj patrioj

Katalunia verkista asocio omaĝis, la 18-an de nov. en Barcelono, al la plurlingva verkisto Manuel de Seabra. Unu el la kvin prelegoj sub la komuna titolo “Liaj multaj patrioj” estis tiu de Herbert Mayer: “La rolo de Esperanto en la verkaro de Manuel de Seabra”.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: Walter van den Kieboom, Flory Witdoeck.

SOCIETO ZAMENHOF 1997

Danio: Emil Vaarst.

DONACIOJ 1997 (NLG)

ĝis la 31-a de oktobro

Fondaĵo Afriko: Nederlando: Esperanto Nederland (memore al Tammo Kanter) 50,00. Sumo ĉi-jara 13 184,60.

Fondaĵo Azio: Japanio: M. Asami 33,30; K. Deguti 66,60; Esperanto-Ligo de Sikoku 33,30; Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto 166,50; I. Katou 33,30. Sumo ĉi-jara 6046,51.

Fondaĵo Canuto: Britio: W. Simcock 10,00. Nederlando: H. ten Hagen 50,00.

Svislando: W. Rieser 14,54. Sumo ĉi-jara 6346,81.

Ĝenerala Kaso: Germanio: W. Ehlers 20,23; O. Hub 3,37; J. Radam 8,99; G. Schmitt 8,99. Nederlando: P. de Blaaij 20,94. Sumo ĉi-jara 7015,48.

Konto Espero: Nederlando: Faulhaber-semajnfino 663,00. Sumo ĉi-jara 3426,76.

Junulara Fondaĵo: Brazilo: Wilson Deslandes 22,00. Sumo ĉi-jara 3767,60.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: W. Simcock 10,00. Francio: M. Prezioso 36,00. Germanio: F.J. Braun 50,00; M. Vogt 30,00. Hispanio: A. Casquero de la Cruz 10,00. Sumo ĉi-jara 1191,98.

Volontula Fondaĵo: Britio: W. Simcock 10,00. Sumo ĉi-jara 3088,00.


Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Tammo KANTER (1930-1997) mortis en Zuidwolde (Nederland) la 15-an de septembro. Eklerninte E-on en 1947, li funkciis (1951-54) kiel prezidanto de TJO/TEJO. Li reaktiviĝis en 1992 kiel delegito pri elektrotekniko, teknikaj instruado kaj tradukado, kaj baldaŭ — helpe al la afrika agado de UEA — ekkompostis la gazetojn *Ondo da Vero* kaj *Alvoko* por Togolando, *Suda Stelo* kaj *Inter ni* por Malagasio.

Volodimir MIŜĈENKO (1936-1997), aktivulo — ekde sia E-eklerno en 1961 — en Kievo kaj Ukrainio, vicprezidinto de la ukraina filio de Asocio de Sovetaj E-istoj, forpasis lastatempe.

Matthew RUTTER (1918-1997), dum 40 jaroj estrarano de la E-klubo en Newcastle-upon-Tyne (Britio) kaj de la Nord-Orienta Federacio, kursgvidinto, UEA-membro pli ol 50 jarojn, forpasis la 4-an de januaro 1997.



Aldo VIOTTO (1933-1997), aktivulo en Triesto (Italio), perdis la vivon la 14-an de oktobro pro stratacidento en Rodik (Slovenio). Li ek-

lernis Esperanton aŭtodidakte en la 60-aj jaroj, intencante pruvi al kolego ke tiu troigas siajn laŭdojn pri la lingvo. Sed baldaŭ Viotto mem fariĝis unu el la plej aktivaj membroj de Triesta Esperanto-Asocio: estrarano ekde 1969, redaktoro de la asocia bulteno *TEA-Infomilo* de 1972, sekretario (1971-1973) kaj prezidanto (1975-77 kaj 1987-94). En 1990, kun Piero Barbieri, li iniciatis EKA (Esperanto-Komerca Agado). En 1989 li kreis por TEA la revuon *La Eta Gazeto*, el kiu kreskis unu el la malmultaj lokaj Esperanto-periodaĵoj tutmonde legindaj. De 1994 li plentempe okupiĝis pri ĝi. Viotto estis Triesta vicdelegito kaj fakdelegito pri aŭtoj, poste pri la Esperanta gazetaro. Plenplena je iniciatoj kaj modernaj ideoj, Aldo Viotto restos neforgesebla kiel ekzemplo de efika, konkreta aganto por Esperanto.

Carl Støp-Bowitz (1913-1997)

Carl Støp-Bowitz, Honora Membro (ekde 1981) kaj vicprezidinto de UEA, mortis la 1-an de novembro en Oslo (Norvegio). Ĉe lia enterigo, la 7-an de novembro, la prezidanto de Norvega E-Ligo (NEL), Torstein Kvakland, demetis florkronon nome de UEA kaj Akademio de Esperanto.

Støp-Bowitz naskiĝis la 8-an de decembro 1913 en Eidsvoll. Post natursciencaj kaj matematikaj studoj en Oslo, li specialiĝis pri zoologio, fako en kiu li profesoris de 1966 ĉe la Universitato de Oslo. Siajn sciencajn studojn li publikigis ĉiam kun Esperantlingva resumo, foje Esperante kun resumo alilingva.

Li esperantistiĝis en 1928, kaj baldaŭ ekaktivis ĉe Klubo Esperantista en Oslo, kies honor-membrecon li meritis per agado sekretario (1931-38, 1947-62), vicprezida (1939-40) kaj prezida (1940-47). Landnivele, por Norvega Esperanto-Ligo li funkciis kiel sekretario (1933-47), prezidanto (1947-77) kaj estrarano (1977-89), kaj fariĝis ties honora membro en 1979. Li estis la LKK-estro de la 37-a UK (Oslo, 1952), gvidis multajn kursojn kaj ofte artikolis en gazetoj norvegaj kaj Esperantaj.

La plej grandajn meritojn Esperantajn Carl Støp-Bowitz rikoltis en la kampo scienca. Dum duona jarcento lia nomo kvazaŭ sinonimis kun tiu de Internacia Scienca Asocio E-ista, kies postmilita restariĝo dankeblas grandparte al liaj klopodoj. Li estis prezidanto (1946-49), vicprezidanto (1949-1980) kaj denove prezidanto (1981-96) de ISAE, kaj aperigis multajn studojn en ties *Scienca Revuo*. Li kontribuis al la Someraj Universitataj Kursoj per kvin prelegserioj biologiaj kaj ekologia, ankaŭ kajere eldonitaj (1972-76), kaj de 1973 prezidis la SUK-asocion. 16 fojojn li prelegis en Internacia Somera (poste: Kongresa) Universitato, kiun li rektoris en 1991.

Membro de la Akademio (1949-97), li proponis krei Sekcion pri Prononcado, kiun li gvidis de 1958 ĝis 1973. Li direktis la Komisionon de Akademiamaj Aprobaj de Fakaj Terminaroj.

Unu el la plej grandaj terminologoj en Esperanto, Støp-Bowitz ellaboris sistemon por esperantigi la sciencan nomenklaturon zoologian, i.a. enkondukante la sufikson *-ed* por familioj kaj la terminon *specio*. Li estis ĉefkunlaboranto de la zoologia parto de PIV, kaj li grave kontribuis al *Poŝatlaso de la mondo* (1971) kaj *Esperanta bildvortaro* (1988). De la komenco (1987) li kunlaboris kun Terminologia E-Centro, gvidante en ĝia kadro (de 1988) Terminografian Komisionon pri botaniko kaj zoologio, kies rekomendoj aperis en la kajero *Zoologia kaj botanika nomenklaturaj* (1994).

Reguleco kaj seninterrompeco karakterizis la agadon de Støp-Bowitz ankaŭ en liaj UEA-funkcioj. Li estis daŭre membro (1936-), fakdelegito pri naturscienco, poste zoologio (1946-), kaj komitatano por ISAE (1956-). De 1974 li funkciis kiel vicprezidanto de nia Asocio dum du mandatoj (1974-80), zorgante pri la faka agado kaj poste (1977-80) ankaŭ la delegita reto.

Støp-Bowitz verkis (kun J.R.G. Isbrücker) la manlibron *La Esperantomovado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato* (1948), kiun li reviziis kaj kompletigis en 1996. Gramatika studo lia, apoge al la atisma teorio pri participoj, aperis en *Esperanto — moderna lingvo* (kun V. Setälä kaj E. Vilborg, 1965). Al la landnoma debato li kontribuis per *Esperanta vortstrukturo kaj Esperanta toponimiko* (1985).

En 1991 Støp-Bowitz ricevis la Regan Oran Medalon, ĉefe pro lia pli ol 50-jara laborado por Esperanto.

“Tago sen Esperanto estas perdita tago por mi” — li skribis. Kun la forpaso de Støp-Bowitz falis komuna kolono de ISAE, UEA, Akademio de Esperanto kaj la norvega E-movado.



Carl Støp-Bowitz en la kvindekaj jaroj

Foto: Verdensgang, Oslo

Ce personaj nomoj kursiva cifero indikas aŭtorecon de teksto, dika cifero rilatas al foto. Aliloke dika cifero aludas relative longan artikolon pri la temo. Ce libroj, kursivaj titoloj signas recenziĝintajn verkojn.

A **Abontarifo** 216
Aborigenoj 142, 146
Afriko 64-65, 110
Ago-Tago 4, 109, 151, 192
Agrikulturo 217
Ahtisaari, M. 94
Akademio de Esperanto 9, 45, 70-71, 76, 86, 90, 133
Akademio Internacia de la Sciencoj 114, 186
Albanio 17, 26, 87, 111, 129
Aleksejeva, I. 161
Ali-Simola, A.-L. 4, 191
Almanza, G. 68
Ameriko 110, 153
Amerio, F. 156
Angolo 38
Annan, K.A. 142
Argentino 94, 97, 110, 112, 118, 138, 168, 191, 198
Armenio 81, 143
Arto 17, 18, 98, 179, 199
Auclair, S. 130, 191
Auld, W. 10, 96, 129, 212
Aŭstralio 21, 24-27, 78, 111, 112, 141-154, 157, 177
Aŭstrio 4, 6, 57, 120, 130, 179, 191
Azio 8, 111, 172

B **Bahaismo** 208
Bakker, H. 67, 110
Balkenende, J. 156
Banet-Fornalowa, Z. 113
Bavant, M. 191
Becker, U. 12, 41, 123
Belartaj Konkursoj 113, 167, 194, 216
Beleva, B. 29, 113
Belgio 18, 48, 50, 59, 61, 78, 111, 112, 159, 173, 192, 199
Beloŝević, M. 49, 81, 87, 148, 159
Benino 41
Bérizzi, P. 99
Bernard, R. 80
Berveling, G. 86, 133
Bharat 105, 131, 178
Bibliografio 10-11
Bibliotekoj 10, 42, 57, 121
Bildstrioj 198, 214
Bioy Casares, A. 138
Bishop, A. 149, 157
Bishop, J. 150, 151, 152, 157
Blanke, D. 9, 10, 42, 48, 77, 86, 90, 102, 106, 114, 124, 139, 173, 199, 209
Blinduloj 59, 127, 138, 170
Bocdiort, I. 50, 167
Bodnárová, K. 110
Bormann, W. 124, 133, 139, 142, 179
Borovečki, I. 125, 143, 164, 166, 192, 197
Bosga, S. 138, 156
Bosnio kaj Hercegovino 28, 41, 50, 97, 111, 171, 198
Botella, A.M. 169, 176
Boulton, M. 76, 154, 217
Brandes, C. 90
Branković, V. 192, 199
Brazilo 17, 19, 41, 47, 97, 110, 139, 152, 159, 190, 191, 192, 198
Breitung, W. 172
Britio 18, 57, 97, 112, 130, 132, 179
Broadribb, D. 24, 143, 165
Brown, H. 35
Brozović, D. 44, 104, 125, 216
Brozovsky, J. 8, 187
Buller, O. 81, 104, 106, 121, 142, 143, 145, 146, 147, 152, 167, 184, 205

C **Camacho, J.** 14, 91, 93, 166, 169
Campos Grez, H. 13, 19, 189
Cash, R. 12
Casquero de la Cruz, A. 169
Centassi, R. 134, 178
Centra Oficejo 56, 67, 81, 88, 106
Centro de Esploro kaj Dokumentado 101, 114

Chalvin, A. 134
Cherpillod, A. 9, 14, 214
Choe T. 59, 86, 140
Chrdle, P. 49, 137, 166
Cibulevskij, D.M. 13, 170
Cleij, P. 77
Cobben, F. 90
Coffinet, E. 9
Corsetti, R. 5, 62, 72, 81, 82, 89, 106, 145, 199
Crisp, B. 174
Cruz, M. 30
Cseh A. 34, 157
Csiszár N. 6, 112, 128
Cunningham, D. 142, 146

Ĉ **Ĉeĥio** 18, 38, 48, 49, 57, 109, 120, 131, 136, 149, 159, 188, 198
Ĉilio 13, 110, 189
Ĉinio 26, 28, 33, 38, 41, 57, 94, 99, 109, 111, 112, 138, 159, 172, 217
Ĉolić, S. 50, 91, 198
D **Dalsem, R. v.** 59
Dang D.D. 190
Danio 111, 112, 158
Darbellay, S. 190
Daŝgupto, P. 16, 90, 213
Dazzini, C. 79, 157
De Geus, F. 107
De' Giorgi, A. 70, 77, 90, 174
Deij, L. 209
Delegitoj 9, 106
De Smet, W.M.A. 28, 99, 198, 209
De Sutter, L. 158
Devi, V. 73
Diego, F. de 168
Dooren, F.v. 20
Duc Goninaz, M. 74, 86, 112, 133, 137, 166
Dulingismo 5, 169
Dungert, D. 124, 169
Durvaal, I. 61

E **Eckstädt, K.** 9, 70, 76
Einihoviči, I. 157
Ekologio 160, 199
Ekspozicioj 17, 48, 57, 98, 159, 191, 192
Eksta, J. 34
Eksteraj rilatoj 5, 6, 84-85, 101, 108, 146, 165, 205
Ekumenismo 179
Ekzamenoj de UEA/ILEI 87, 113, 145
Eldonado 74, 96, 136, 211
Enderby, K. 142, 147, 148, 150-154
Erasmus, H. 109, 165
Ertl, I. 81, 106, 146, 148, 152, 166, 167
Estonio 41, 48, 49, 139, 191
Estrara Raporto 105-116
Estraro de UEA 81, 106, 143
Etnismo 153
Eŭropa agado 6, 23, 44, 67, 98, 109, 124, 138, 165, 190
Eŭropa Burao por Malpli Uzataj Lingvoj 101, 108
Eŭropo 28, 61, 111, 124, 125, 127, 159

F **Fakaj asocioj** 46, 114, 127, 147, 153, 158, 170, 201
Falk-Bracke, H. 190
Feičiová, M. 158
Ferez, G. 177
Fernández, M. 169, 174
Fervojistoj 34, 59, 158
Fettes, M. 85, 101, 106, 108, 109, 114, 122, 177, 182
Figiera, G.C. 78, 162, 169, 209
Figiera-Sikorska, A. 74, 78, 91, 151, 169, 177
Filatelo 105, 125, 178
Filmo 150, 170
Financo de UEA 81, 107, 115-116
Finlando 4, 18, 49, 66, 94, 111, 138, 179, 189, 192
Flandrio 61, 173
Foliome 13, 34, 74, 94, 176
Fondadoj
Biblioteka Apogo 121
Canuto 67, 106, 107
FAME 89, 137
Grabowski 113, 152

Konto Espero 5, 67
Saliko 152, 157, 171
Fonseca, F. 167
Forumo 16, 36-37, 69, 91, 173
Fox, B. 149
Francio 5, 18, 19, 28, 41, 48, 49, 50, 57, 78, 97, 99, 111, 112, 119, 132, 139, 153, 157, 178, 185, 190-192, 199
Freitas, M. de 40
Fröhlich, R.G. 6, 112
Futbalo 64

G **Gados L.** 131, 169, 190
Gaines, D. 19
Gama, J. 97
Gates, R.C. 142, 149, 152, 174, 177
Gazizi, G. 159, 168
Gbeglo K. 152
Germanio 38, 41, 48, 49, 94, 97, 98, 124, 130, 158, 179, 188, 199, 217
Gibczyńska, J. 113, 143, 150, 157, 165, 177
Giessner, J. 158
Gilbert, F.-X. 199
Gil-Robles, J.M. 44, 67
Golden, B. 8, 32, 57, 70, 71, 77, 90, 125, 131, 190
Golden, L. 128, 202
Gómez i Besòs, M. 156
Goralski, A. 74
Gorecka, H. 4, 96
Greatrex, G. 47, 109, 129, 189
Grekio 17, 188
Grimley Evans, E. 128, 210
Grimme, L. 100
Grosjean, M. 208
Grossman, R. 85, 104, 108, 123
Gubbins, P. 113, 151, 157, 171, 179
Gulýás I. 158
Gutiérrez, M. 68, 166, 169, 176

Ĝ **Ĝemeligoj** 159, 178, 199
H **Haaf, D.** ten 81, 143
Hagen, H. ten 87, 106, 145, 157
Handikapuloj 105
Harmon, W. 8, 191
Harry, R. 78, 92, 142, 146, 148, 150, 177, 188
Hauptenthal, R. 13, 34, 90, 211
Herzog, R. 188
Hiroshi N. 89, 199
Hispanio 17, 38, 41, 47, 78, 83, 87, 98, 99, 111, 112, 169
Historio 18, 34, 88, 161, 187, 199, 201
Honkongo 138, 172
Honoraj Membroj 106, 143, 164
Honoraj Patronoj 164
Hounnake, R.K. 64
Hungario 7, 28, 34, 35, 57, 78, 86, 97, 118, 128, 129, 131, 139, 169, 176, 178, 179, 186, 190, 192, 199, 202, 216

I **Ilutovič, K.** 168
Infanoj 169
Influo (suplemento pri informado) 47-50, 109, 129-132, 189-192
Informado 4, 18, 31, 88, 97, 99, 103, 109, 128, 151, 159, 217
Institutoj 107
Instruado 5, 17, 19, 28, 29, 57, 59, 86-87, 97, 98, 112, 118, 130, 157, 171, 179, 188, 198, 209
Interlingvistiko, esperantologio 10-11, 32, 86, 128, 139, 173, 181, 186
Internacia Kongresa Universitato 117, 149, 172, 186
Internacia Semajno de Amikeco 25, 153, 207
Interreto, TTT 18, 47, 48, 111, 132, 153, 168, 176, 181, 210
Intervjuoj 96, 136, 149, 150, 171, 172, 177, 181
Irano 50, 83, 103, 111, 130, 192
Irlando 57, 111
Islando 112
Israelo 121, 159, 217
Italio 4, 17, 26, 28, 38, 48, 50, 82, 98, 103, 111, 112, 117, 120, 139, 156, 159, 168, 176, 178, 179, 187, 190, 192

J **Japanio** 8, 13, 19, 50, 78, 83, 88, 98, 102, 138, 187, 216, 217
Jegorovas, P. 81, 108, 111, 152
Jerman, V. 44, 104, 125, 151, 166, 167, 197
Johano Paŭlo la 2-a 187
Johansson, S. 113, 167
Jordan, D.K. 33, 178
Jugoslavio 17, 44, 49, 72, 103, 170, 190, 216
Junier, G. 157
Junularo 6-7, 31, 36, 38, 47, 48, 112, 117, 128, 156, 208
Junusov, A. 50, 192
Juro 153

J **Jurnalismo** 154
K **Kalendaro** 51, 126, 193
Kamerunio 44
Kampanjo 2000 1, 62-64, 82-83, 91, 101-104, 122-125, 144, 162, 182
Kanado 26, 130, 132, 191
Kane, D. 151
Kankkunen, A. 73
Karpunina, L. 167
Kasedo: Teatra vespero de Vida Jerman 197
Kasymova, N. 94, 199
Kaszás A. 128, 156
Katalunio 57, 73, 111, 178, 198, 217
Katoj 154
Kavka, J. 89, 137
Kawamura S. 78
Kebekio 48, 132, 191
Kikusima K. 170, 171
Kniivilä, K. 145, 196, 213
Knoedt, L. 212
Kohci, E. 200
Kohrs, C. 157
Kolker, B. 77
Kolombio 13
Komercio 19, 59
Komitato de UEA 106, 143, 184
Kompaktisko: espeRom 94
Komputado 30, 139, 179
Kongresoj, aranĝoj
9-a Alp-Adria 159
45-a de ELNA 178
2-a Eŭropa E-Festivalo 169
7-a Eŭropa E-Forumo 169
3-a Eŭrop-Una Esperanta 124
56-a Hispania 169
50-a de IKUE 187
1-a ILEI-Konferenco 157
1-a Interinsula E-ista 65, 110
7-a Internacia E-Kongreso 169
49-a de IFEF 158
63-a IKBE (Blinduloj) 170
53-a Internacia Junularo 117, 156
40-a Internacia Seminario 38
28-a Kataluna 178
1-a de la Kroataj E-istoj 125
19-a Renkontiĝo de E-Familioj 169
Rusia '97 58
70-a de SAT 37
4-a Togolanda 64
1-a Transpirenda 178
Trilanda Renkontiĝo 158
Universalaĵ 91
81-a Universala 107
82-a Universala 141-154
83-a Universala 145, 185
84-a Universala 145, 188
85-a Universala 104, 145, 121
Koreio 88, 138, 187
Korespondanta Servo Mondskala 46
Korjenkov, A. 74, 96, 117, 168, 173
Kotizoj 26, 81, 145, 168
Kourny I. 35, 86, 128, 139
Kozič, F. 140
Kroatio 17, 38, 44, 48, 49, 78, 98, 104, 111, 125, 144, 159, 169, 178, 192, 199, 216
Kubo 17, 68, 112, 120, 152, 159, 178, 179, 199
Kulturo 19, 89, 113, 121, 137, 146
Künzli, A. 13, 201
Kurisu K. 137, 169

L **Laste aperis** 15, 35, 55, 75, 95, 118, 135, 155, 175, 195, 215
La Torre, M. 139, 149
Lebedeva, J. 80

- Lécaille, P. 83, 156
 Leclercq, J.-M. 178
 Ledon, G. 147, 148, 154, 166
 Ledon, S. 110, 159
 Lee C.-Y. 1, 62, 81, 84, 101, 106, 108, 109, 123, 137, 142, 145, 149, 152
 Le Puil, J. 166
 Levin, M. 60
 Li Hajpin 80, 140
 Libroj:
La aĵoj kaj la sezonoj 12
Al la mondo donace 167, 216
Andreo Cseh – la "gaja stelo" kiel "edzperanto" 34
Antologio de kroataj unuaktaj dramoj 125, 166
Armeoj de Paluzie, La 73
Cina ceramiko 33
Eksstremo 166
El miaj sonoraj soloj 174
Enciklopedieto de Cinio 33
English as a global language 148
Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj 196
Fenomeno Esperanto, La 129
Fervoja terminaro 158
Franz Schubert 166
Germanaj bieroj kaj bierkulturo 33
Gesta d'Utnoa, La 74
Hiĉba – A jövö 202
Historio de la ciferoj 14
Homme qui a défié Babel, L' 109, 134
Hungara lingvokurso 35
Infanoj en la arboj, La 35
Internacia familio – utopio aŭ realaĵo? 196
Katarismo kaj naskiĝo de Inkvizicio 14
Kiel ĉiuj katetoj 166
Klera edzino 213
Kolera afero 174
Konciza gramatiko de Volapuko 14
Kulturo kaj teknologio 213
L.L.Zamenhof: Datoj, faktoj, lokoj 215
Ludanta lumo, La 13
Madjaroj (hungaroj) en Vojvodino 72
Malfacilas esti dio 213
Maljunulino kiu paŝis en la maro, La 166
Memorlibro omaĝe al A. Cseh 34
Metamorfozo, La 93, 113
Monumente pri Esperanto 92, 152, 166, 209
Morto de sciencisto 174
Mortotutoko de Torino, La 14
Multkulturaj familioj de la nuntempa Eŭropo 114, 196
Neniu povas ŝanĝi hieraŭon 73
Nuda feino, La 13
Paŝloroj kaj stoploj 212
Panoramo de la novaj... 12
Pikniko ĉe vojrando 213
Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko 18, 210
Pli ol homo, esperantisto! 214
Pluralogo 73
Refoje krimnoveloj sep 174
Romantikulo en la 20a jc., La 214
Ruĝdoma sono 72
SE/M. Historia skizo 13
Sep krimnoveloj 174
Sono kaj aliaj rakontoj 93
Sonĝonovelo 166
Taglibro de Anne Frank 88, 166
Teknikaj kajeroj 166
Tria kolekto da krimnoveloj 174
Vino, viroj kaj kanto 73
Vivu la kanto! 74
Zamenhof kaj judismo 214
 Libroservo de UEA 56, 106, 107, 209
 Lienhardt, A. 60
 Lingvistiko 32, 148, 186, 199
 Lingvo 8, 9, 32, 71, 89
 Lingvopolitiko 101
 Lins, U. 9, 92, 124, 213
 Lipari, M. 67, 90, 106, 107, 112, 113, 152, 170
 Literaturo 38, 59, 94, 118, 154, 166-168, 176, 202-205, 210-211, 217
 Litovio 59, 109, 111, 139
 Lo Jacomo, F. 70, 84, 109, 133, 190
 Ludwig, E. 191, 192, 205
 Lutete, M. 65
 MacGill, D. 40
 MacGill, S. 157, 169, 209
 Madagaskaro 44, 65, 110, 119
 Maertens, G. 106
 Maitzen, H.M. 109, 172, 198
 Mak, B. 7, 172
 Malovec, M. 13, 85, 91, 137, 196
 Malto 48, 83
 Manifesto de Prago / de la Esperantomovado 24, 32, 45, 71, 83, 103, 122, 125, 141, 173, 207
 Manson, J. 160
 Mao Z. 72, 94, 152
 Marček, S. 127, 158
 Marco Botella, A. 17, 176
 Mařík, J. 120
 Martinelli, P. 70, 74, 76, 90, 133, 168
 Masson, H. 134
 Matland, E. 9
 Mattos, G. 17, 47, 70
 Maul, S. 89, 137, 154
 Maxey, B. 110, 178
 Medicina 99, 139
 Membraro de UEA 66, 105, 117, 173
 Minnaja, C. 38, 70, 78, 168, 198
 Modest, J. 29
 Moerbeek-Bartels, N. 19, 88, 166, 170
 Monostori, S. 149
 Montagut, A. 74
 Mozambiko 17
 Muzeoj 42, 59, 78, 99, 157, 160
 Muziko 19, 78, 178
 Nanovszky G. 44, 50, 169
 Nederlando 19, 32, 48, 50, 88, 111, 130, 138, 173, 181, 199
 Nefumismo 19
 Nekrologoj 20, 40, 59, 79, 100, 120, 140, 180, 200, 218
 Nemere I. 169, 192
 Nervi, M. 93, 113
 Neves, G. 12, 48, 169
 Ngangu, N. 44, 110
 Nguyen H.T. 200
 Niansi N. 37, 41, 112
 Niĝerio 110
 Niĝerlando 160
 Nischwitz, H. 217
 Nisio T. 187
 Nitobe I. 108, 187
 Norvegio 111, 112
 Nourmont, C. 81, 152
 Novobilsky, V. 198
 Nov-Zelando 111
 Nowakowski, J.M. 217
 Ntawir, H.N. 65
 Numismatiko 125
 Oceanio 111
 Ōe K. 160
 Oesterheld, H. 198
 Oficiala Informilo 20, 39, 58, 79, 99, 139, 160, 179, 200, 217
 Oittinen, T. 190, 192
 Onet, I. 22, 88, 171, 191, 215
 Oomoto 8, 153
 Oostendorp, M. van 173, 181
 Orellana Rojas, A. 87, 88, 94, 110, 145, 153, 157
 Ošlak, V. 167
 Oterma, L. 143, 165
 Pagliaroli, F. 146
 Pakistano 18, 38, 99, 111, 112, 119, 158
 Pavskij, B. 138
 Payne, V. 24, 142
 Petrović, Radjica 171
 Petrović, Renato 7, 49, 190
 Petyn, A. 46, 131, 140, 154, 166, 172
 Piĉismo (punk-bando) 19
 Pietiläinen, J. 192
 Pilger, W. 168
 Pirlot, G. 23, 44, 67, 165
 Polgár Z. 160
 Pollando 7, 46, 57, 59, 86, 103, 111, 112, 128, 131, 145, 159, 177, 190, 217
 Portugalio 48, 111
 Premioj
 Deguči 113, 153
 Grabowski 152
 Kulturpremio de FAME-Fondaĵo 89, 137, 217
 de OSIEK 188
 Pirlot 198
 Subvencio Cigno 152
 Trofeo Fyne 152
 Verko de la Jaro, La 94
 Princz O. 90, 169
 Propedeŭtiko 152, 157
 Psikologia 161
 Radikala Partio, Transnacia 101
 Radio 28, 46, 98, 103, 119-120, 130, 131, 139, 140, 154, 190-192, 206, 217
 Rados P.A. 13, 169, 178
 Randin, F. 188
 Rapley, J. 188
 Rašić, N. 106, 125, 214
 Reagoj 9, 76, 90, 209
 Recenzoj 12-14, 33-35, 72-73, 92-93, 134, 174, 196, 212-215
 Religio 98, 118, 154, 158, 179, 187, 201, 217
 Restoracioj 59, 198
 Revuoj
 Afrika Reto, La 110
 Alvoko 110
 Bazarro 94
 Boletin 176
 Bosnia Lilio 198
 Brazilo Esperantisto 152
 Cerbe kaj kore 168
 Cizilo 74
 Debrecena Bulteno 176
 Esperanta Gejaro 94
 Esperantisto Slovaka 127
 Esperanto 81, 108
 EsperantoŬC 34
 Esperanto, L' 190
 Esperanto aktuell 176
 Esperanto en Azio 111
 Esperanto sub la Suda Kruco 74
 Eta Gazeto, La 176
 Eventoj 74
 Fervojfakaj Kajeroj 158
 Forumo 94
 Gazeto Andaluzia 17, 74, 176
 Heroldo de Esperanto 74, 91, 209
 Hungara Fervojista Mondo 34
 Informilo por Interlingvistoj 114
 Internacie Neŭtrala Bulteno Esperantista 74
 Inter Ni 110
 Juna Amiko 157
 Jura Tribuno Internacia 153
 Kolombia Bulteno 13
 Kontakto, La 74
 Kontakto 81, 108
 Laga sono 98
 Language Problems and Language Planning 114
 Litova Stelo 152
 Lumilo, La 153, 154
 Ondo da Vero 110
 Ondo de Esperanto, La 74, 96
 Penseo 94
 Puraj Pulmoj 19
 Rezende Piton, J. 47, 153
 Ritamäki, A.M. 6, 7, 112, 153, 189
 Roff, D. 13
 Rohdin, K. 35
 Röllinger, H. 92, 152
 Rössler, F.-G. 73, 199
 Rotario 60
 Rotsaert, R. 42
 Rumanio 50, 83, 94, 111, 156, 158
 Rusio 4, 44, 48, 50, 58, 66, 83, 96, 118, 130, 138, 161, 168, 179, 192
 Sabelli, R. 127
 Sarandrea, C. 187
 Schicke, H. 33, 74, 154
 Schmid, H. 37
 Scienco 114, 138, 186, 218
 Seabro, M. de 73, 217
 Semjonova, O. 167
 Sennacieca Asocio Tutmonda 37, 143, 147
 SERVAS 85, 188
 'Sigmond J. 94, 167
 Silfer, G. 168, 173
 Sindikatoj 78, 99
 Sinno, T. 158
 Skoltismo 7, 19, 98, 189
 Sloper, M. 22, 170, 171, 191, 214
 Slovakio 98, 111, 127, 131, 158, 191
 Slovenio 4, 50, 158, 159
 Smideliusz K. 34, 146, 157, 186, 192
 Sociala laboro 19
 Societo Zamenhof 106
 Solis, A. 90
 Soliva 180
 Sređić, G. 158
 Srilanko 44
 Starck, J. 59, 178
 Steele, T. 21, 83, 143, 147, 149, 150, 152, 154, 157, 166, 177
 Stocker, F. 49, 124
 Stöp-Bowitz, C. 218
 Strategio de UEA 2, 22, 162
 Stryhn Meyer, J. 128, 156
 Suchánek, J. 142, 149
 Sud-Afriko 17
 Sujet, M. 76
 Svedio 17, 48, 58, 83, 98, 111, 112, 120, 138
 Svislando 17, 44, 78, 117, 127, 170, 173, 208
 Szathmári S. 202-205
 Székely C. 36, 77
 Szilvási L. 128, 129, 210
 Štítec, S. 104, 125, 154, 166, 169, 192, 197, 199
 Tagikio 94, 199
 Tantin-Ackermann, E. 81, 153, 159, 207
 Tautorat, H.D. 59
 Teatro 29, 68, 78, 107, 113, 125, 150, 157, 197
 Teatraĵoj
Anĝeloj de Babelo, La 125
Ĉu la nepoj nin benos? 157
Inventante ke mi songas 44, 151, 197
Noemi 151
Zamenhof 150
 Televido 130, 131, 171, 190-192
Esperanto, pasporto al la tuta mondo 8, 145, 153, 157, 171
 Teodorowicz-Todorowski, T. 177
 Terminologio 89, 98, 158
 Thorsen, P. kaj R. 121
 Tišljár, Z. 69, 124, 125, 196, 209
 Tófalvi É. 202
 Togolando 44, 64, 110, 178
 Tonkin, H. 2, 10, 22, 32, 86, 90, 101, 106, 133, 162
 Torabi, M.R. 6, 156
 Trenner, S. 167, 208
 Triolle, R. S. 84, 109-113, 152
 Truong, J. 6, 101, 122, 156
 Turismo 19
 Ukrainio 4, 50, 156, 170
 Umeseo T. 138
 Unesko 84, 104, 108, 113, 142, 146, 205, 213
 Ungar, K. 33
 Universala Ligo 114
 Universitatoj 86, 87, 99, 112, 128, 139, 173, 179, 181
 Unuigintaj Nacioj 85, 101, 142, 188
 Urbanová, E. 73, 137
 Urueña, R. 153, 169
 Usono 19, 44, 49, 50, 112, 130, 160, 170, 171, 178, 191
 Usui H. 77
 Vaitailavičius, A. 80
 Valén, A. 14, 73, 213
 VanDamme, G. 169
 Vanden Bempt, M. 35, 98
 Velikov, J. 208, 219 (kontrollegis ĉi indekson)
 Venezuelo 27, 62, 82
 Verloren van Themaat, W. 10, 40
 Verne, J., 57, 98
 Veuthey, F. 81, 106, 138
 Vidbendoj 9
Alpoj suisaj, La 167
Mazi en Gondolando 157
 Vigotskij, L. 161
 Viotto, A. 50, 218
 Vitali, D. 148, 153
 Vjetnamio 44, 105, 111, 190
 Vogelmann, B. 13, 74, 89, 137
 Volapuko 14
 Vortaroj 19, 34, 38, 89, 179
 Wandel, A. 45, 46, 70, 81, 84, 85, 106, 109, 114, 121, 153, 154, 186
 Wells, J. 86, 94, 128, 143, 146, 147, 148, 149, 164, 190
 Westerhoff, B. 208
 Williams, N. 60
 Williams, P. 150
 Wouters, M. 59
 Xie Y. 72
 Yamasaki S. 45, 114, 138, 141, 143, 147, 154
 Zairio 44, 65, 67, 110
 Zaleski-Zamenhof, L.C. 143, 157
 Zamenhof, L.L. 8, 9, 11, 76, 134, 150, 201
 Zamenhof-tago 26, 41, 44
 Zapelli, P. 66, 81, 106, 152
 Zaragoza Ruiz, F. 200
 Zeng H. 60
 ZEO-j 19, 38, 92, 99, 139, 154, 199
 Zimbabvo 110

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA

RIKOLTO DE 50 JAROJ

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindeko de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorecenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofondiĝis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!



INTERESKAPTA LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Studo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologian evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologian ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

KAJ PLIE...

POR POLITIKO DE ESPERANTO. A. Chiti-Batelli. Pledo por tuja ekago kontraŭ lingva hegemonio. 23p. Prezo: 4,80 gld.

Sama en la angla: **A POLICY FOR ESPERANTO.** Prezo: 4,80 gld.

Sama en la franca: **POUR UNE POLITIQUE DE L'ESPÉRANTO.** Prezo: 4,80 gld.

KIEL ĈIUJ KATETOJ. A. Usakiewicz. Ilustr., plenkolora. Ok rakontoj por legi kaj kunĝui familie. Eld.: KLEKS. 64p. Prezo: 24,00 gld.

FRANZ SCHUBERT – MUZIKA ALBUMO. Plenkolora ilustrita vivrakonto de la fama komponisto por (ne nur) infanoj. Eld.: KLEKS. 28p. Prezo: kun KD (60 min.) 54,00 gld.; sen la disko: 30,00 gld.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

la dua duafoje!

Jes, la dua kajero de la komunik-stila lernolibra serio *Tendaraj tagoj* atingis duan eldonon. Jen ĝi, kun 20 plusaj paĝoj, novaj bildoj kaj eroj, tri pliaj koloroj kaj la konataj roluloj.



Tendaraj tagoj, kajero 2, Stefan MacGill, ILEI/UEA/HJEA, Budapest, 1997. 72p. Ilus. de Pavel Rak. Mendu ĉe UEA: 15 NLG, triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis 60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1998...

Esperanta Antologio. La plej impona kolekto de originalaj poemoj. 900p. Bindita. 60 gld. **24 gld.**

Ni kaj ĝi. Eseo de Waringhien pri religio kaj arto. 346p. 45 gld. **18 gld.**

Nova Esperanta krestomatio. Moderna antologio de E-literaturo. 510p. Bindita. 57 gld. **33 gld.**

Infoduktoj. Pri la komputila revolucio. 142p. 19,50 gld. **9 gld.**

Faktoj kaj fantazioj. Marjorie Boulton. Renoma progresiga legolibro. 431p. 36 gld. **18 gld.**

La arbo de la sciado. Filozofia romano de Pio Baroja. 222p. 24 gld. **12 gld.**

Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. John Wells. 76p. 15 gld. **9 gld.**

Kantoj kaj romanoj. La famaj ampoemoj de H. Heine. 381p. 39 gld. **18 gld.**

La danĝera lingvo. Ulrich Lins. Studo pri persekutoj kontraŭ Esperanto. 546p. 66 gld. **39 gld.**

Studoj pri la Internacia Lingvo. En Eo/angla/franca/germana. 155p. 24 gld. **18 gld.**

Tiu ĉi oferto validas ĝis la 31a de dec. 1997. Mendojn bv. adresi al la Libroservo de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendokostoj je 10% (minimume 5 gld.) kaj, por loĝantoj en EU, imposto je 6%.

ANONCU EN JARLIBRO 1998!

En la Jarlibro de UEA via anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 7000 aktivaj esperantistoj plurfoje vidos vian reklamon, ĉar la Jarlibron oni konsultas tra la tuta jaro.

Movada prezo Ekstermovada prezo

Kvarona paĝo	125 gld.	250 gld.
Duona paĝo	225 gld.	455 gld.
Tuta paĝo	415 gld.	825 gld.
Kovrilpaĝo	825 gld.	1650 gld.

Se vi varbas ekstermovadan reklamon, ni pagos al vi 30% de la prezo kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. Limdato por la mendoj: 31-a de januaro 1998.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519, Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 92,00 gld.

Institucia abono: 185,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.